

VIKTORO HUGO

LEGENDO

PRI LA BELA PEKOPENO

KAJ LA BELA BOLDURA

el "Le Rhin" (Rejno)

el la franca originalo
esperantigis VALO.

SAT-Broŝurservo
1988 * 15 FF

VIKTORO HUGO

LEGENDO

PRI LA BELA PEKOPENO

KAJ LA BELA BOLDURA

el "Le Rhin" (Rejno)

**el la franca originalo
esperantigis VALO.**

La vortoj signitaj en la teksto per * estas difinitaj
en fina glosaro.


SAT-Broŝurservo

1988

La Literatura Komitato de SAT, esplorinte mian manuskripton, bonvolis konsenti pri la kontrolvinjeto, sed ĝi malaprobas mian oftan uzadon de la pronomo "ĉi". Mi tamen persistas pri tiu uzado, sub mia propra respondeco, pro jam plurfoje eksponitaj motivoj.

Mi ŝuldas multon al Kdo Edward P. Ockey, sekretario de la Literatura Komitato, kies valoraj kritikoj kaj sugestoj helpis min por tre plibonigi mian tradukon. Mi povas eĉ diri, ke en multaj lokoj lia kontrolo fariĝis vera kunlaboro. Pro tio mi esprimas al li grandan dankon.

La tradukinto.



ENKONDUKO

Inter la jaroj 1838 kaj 1840 Viktoro Hugo faris tri vojaĝojn al Rejnlando, dum kiuj li skribis leterojn, rakontante siajn etapojn, siajn spertojn, siajn eltrovojn kaj impresojn.

Reveninte en Parizo, li reprenis tiujn tekstojn, ilin re prilaboris, kompletigis kaj ordigis por konsistigi libron sub la titolo "**Le Rhin**" (Rejno). En 1842 li verkis antaŭparolon al la unua eldono. La dua, pli kompleta kaj definitiva, aperis en 1845.

La "**Legendo**" estas unu el tiuj parizaj aldonoj, fikcie datita de Bingen, aŭgusto (1838). Tiu fantasta fabelo, inspirita de pluraj germanaj legendoj, sed tute prilaboritaj kaj kunfanditaj per la genia imago de la granda romantika poeto, estas legebla el pluraj vidpunktoj: beletristika, filozofia, eble ankaŭ psikanaliza.* Jen estas tiu "legendo", kiun mi provis transskribi en la Lingvon Internacian.

La tradukinto.

* Kiel oni vidas, en ĝi ne mankas ankaŭ humuro.

Bingen, aŭgusto.

Mi promesis al vi unu el la famaj legendoj de Falkenburgo¹, eble eĉ la plej belan, la malluman aventuron de Guntram kaj Liba. Sed mi pripensis. Kial nome rakonti al vi aferojn, kiujn rakontas la unue renkontita kolekto, kaj pli bone ol mi? Ĉar vi nepre deziras historiojn por viaj genepoj, jen estas unu, amiko mia. Ĝi estas legendo, kiun almenaŭ vi trovos en neniu legendaro. Mi sendas ĝin tia, kia mi ĝin skribis sub la muroj mem de la disfalinta kastelo, kun antaŭ la okuloj la fantasta arbaro de Sonneck²: kaj, kiel al mi ŝajnas, sub la diktado mem de la arboj, de la birdoj kaj de la vento en la ruinoj. Mi estis ĵus interparolinta kun maljuna franca soldato fariĝinta kapro-paŝtisto sur tiuj montoj, kaj iĝinta preskaŭ sovaĝa kaj preskaŭ sorĉista: stranga fino por ĉeftamburisto de la 37a malpezinfanteria regimento. Tiu bonulo, eks-trupinfano³ en la volteranaj armeoj de la respubliko, ŝajnis al mi, ke li kredas nun pri feinoj kaj gnomoj, kiel li iam kredis pri la imperiestro. Ĉiam la soleco tiel efikas al la inteligento: ĝi elvolvas la poezion, kiu ĉiam estas en la homo; ĉiu paŝtisto estas revulo. Mi do skribis tiun ĉi fabelon sur la loko mem, kaŝate en la valetfosajo, sidante sur bloko, kiu iam estis roko, kiu fariĝis turo en la 12-a jarcento, kaj kiu refariĝis roko, de tempo al tempo plukante, por ties animon spiri, sovaĝan floron, unu el tiuj konvolvuloj, kiuj tiel bonodoras, kaj tiel frue mortas, kaj rigardante laŭvice la verdan herbon kaj la brilradian ĉielon, dum grandaj oraj nuboj disŝiriĝis ĉe la malhelaj ruinoj de Falkenburgo.

Kun tio dirita, jen estas la historio.

¹ Falko-kastelo

² pr. Zonek = sun(lum)a angulo.

³ trupinfano : milita orfo vartata en arma speciala lernejo kun militista disciplino, trejnita kiel juna soldato. Tiuj infanoj soldatiĝis en pli frua aĝo ol la ordinaraj konskripto.

I. Legendo

La bela Pekopeno amis la belan Bolduran, kaj la bela Boldura amis la belan Pekopenon. Pekopeno estis filo de la burggrafo de Sonneck, kaj Boldura estis filino de la sinjoro de Falkenburg. Unu posedis la arbaron, la alia posedis la monton. Nu, kio pli simpla ol geedzigi la monton kun la arbaro? La du patroj interkonsentis, kaj oni fianĉinigis Bolduran al Pekopeno. Tiun tagon, ĝi estis tago de aprilo, la sambukoj kaj la kratagujoj en florado sin malfermis al la sunradioj en la arbaro, mil ĉarmaj kaskadetoj, neĝoj kaj pluvoj ŝanĝitaj je riveretoj, abomenoj de vintro fariĝintaj graciaj de printempo, harmonie saltetadis sur la monto, kaj amo, tiu aprilo de la homo, kantis, radiis kaj elvolvigis en la koroj de ambaŭ gefianĉoj.

La patro de Pekopeno, maljuna, vigle kuraĝa kavaliro, honoro de Nahegau¹, mortis kelkan tempon post la gefianĉa akordiĝo, benante sian filon, kaj al li rekomendante Bolduran. Pekopeno ploris; poste, iom post iom, de la tombo, en kiu malaperis lia patro, liaj okuloj turniĝis al la dolĉa radia vizaĝo de la fianĉino, kaj li konsoliĝis. Kiam leviĝas la luno, ĉu oni pensas pri la subiĝinta suno?

Pekopeno havis ĉiujn kvalitojn de nobelo, de junulo kaj de viro. Boldura estis reĝino en la kastelo, sankta virgino en la preĝejo, nimfo en la arbaroj, feino ĉe la laboro.

Pekopeno estis granda ĉasisto, kaj Boldura estis bela ŝpinistino. Nu, ne estas malamo inter la ŝpinilo kaj la ĉasista sako. La ŝpinistino ŝpinas, dum la ĉasisto ĉasas. Li estas for, la ŝpinado konsolas kaj malenuigas. La hundaro, malproksima kaj apenaŭ aŭdata, miksitaj kun la korno-sono kaj profunde perdita en la densejoj, diras mallaŭte

1. Nahegau: valo de rivero Nahe, alfluanta al rejno inter Bingen kaj Bingerbrück - N. de la tr.

kun konfuza bruo de fanfaro: Pensu pri cia amanto. La ŝpinrado, kiu trudas la belan revulinon mallevi la okulojn, diras laŭte kaj senĉese, per sia dolĉa kaj severa voĉeto: Pensu pri cia edzo. Kaj kiam la edzo kaj la amanto estas unu, ĉio bona.

Do edzinigu la ŝpinistinon al la ĉasisto, kaj nenion timu.

Tamen, mi devas diri, Pekopeno tro amis la ĉason. Kiam li rajdis sur sia ĉevalo, kiam li havis la falkon sur la pugno, aŭ kiam li sekvis per la rigardo la tartareton*, kiam li aŭdis la kruelegan bojadon de siaj tordkruraj ĉashundoj, li eksaltis, li flugis, li ĉion forgesis. Nu, en neniu afero oni devas trovi. La feliĉo konsistas el modero. Tenu en ekvilibro viajn gustojn kaj en brido viajn impetojn. Kiu tro amas la ĉevalojn kaj la hundojn, ofendas la virinojn. Kiu tro amas la virinojn, ofendas Dion.

Kiam Boldura, kaj tio tre ofte okazis, kiam Boldura vidis Pekopenon preta por foriri sur sia ĉevalo henanta pro ĝojo kaj pli fiera ol se ĝi portus Aleksandron la Grandan en imperiestra vesto, kiam ŝi vidis Pekopenon ĝin flati, karesi ĝian kolon per la mano kaj, formetante la spronon de ĝia flanko, prezenti al la kurĉevalo herbobukedon por ĝin refreŝigi, Boldura estis ĵaluza pro la ĉevalo. Kiam Boldura, tiu nobela kaj fiera fraŭlino, tiu astro de amo, juneco kaj beleco, vidis Pekopenon karesi sian dogon, amike proksimigi al sia ĉarma vira vizaĝo tiun platnazon, tiujn dikajn naztruojn, tiujn larĝajn orelojn kaj tiun nigran faŭkon, Boldura estis ĵaluza pro la hundo.

Ŝi revenis en sian privatan ĉambron, kolera kaj malgaja, kaj ŝi ploris. Poste ŝi riproĉadmonis siajn servistinojn, kaj post siaj servistinoj ŝi riproĉadmonis sian nanon. Ĉar la kolero ĉe la virinoj estas kiel la pluvo en arbaro: ĝi falas dufoje. **Bis pluit.**¹

Vespere Pekopeno revenis polvokovrita kaj laca. Boldura iom paŭtis kaj murmuris, kun larmo en la angulo de sia blua okulo. Sed Pekopeno kisis ŝian malgrandan manon, kaj ŝi eksilentis: Pekopeno kisis ŝian belan frunton, kaj ŝi ekridetis.

1. Dufoje pluvus (latine).

La frunto de Boldura estis blanka, pura kaj admirinda kiel la ebura korno de reĝo Karlomagno¹.

Poste ŝi retiriĝis en sian tureton, kaj Pekopeno en sian. Ŝi neniam permesis, ke tiu kavaliro prenu ŝin je la zono. Iun vesperon li apenaŭ premetis ŝian kubuton, kaj ŝi tre ruĝiĝis. Ŝi estis fianĉino, ne edzino. Hontemo estas por la virino, kio kavaliro estas por la viro.

1. lat. Carolus magnus, germ. Karl der Grosse, fr. Charlemagne - N. de la tr..

II. Birdo Fenikso kaj planedo Venusa.

Ili enviinde adoris unu la alian.

Pekopeno havis en sia armilhalo en Sonneck grandan orumitan pentraĵon reprezentantan la ĉielon kaj la naŭ sferojn, ĉiun planedon kun ĝia koloro kaj ĝia nomo apude skribita per cinabroruĝo; Saturno plumbeblanka, Jupitero hela sed flamlumigata kaj iom sanga; Venusa la orienta, braĝe fajra; Merkuro sparke brila; la Luno kun ĝia argenta spegulo; la Suno tute radiante fajra. Pekopeno forviŝis la nomon Venusa, kaj anstataŭe skribis: Boldura.

Boldura havis en sia parfumĉambro altveluran tapeton, sur kiu estis figurita birdo de agla grando kun orumita kolringo, purpurkolora korpo, blua vosto kun karnoruĝaj direktoplumoj, kaj sur la kapo kresto kun surstaranta plumtufo. Sub la mirinda birdo la fabrikinto skribis jenan grekan vorton: **Phenix**. Boldura forigis tiun vorton, kaj anstataŭe brodis jenan nomon: Pekopeno.

Dume proksimiĝis la tago fiksita por la geedziĝo. Pro tio Pekopeno estis ĝoja, kaj Boldura estis feliĉa.

En la ĉashundejo de Sonneck estis rajda hundservisto, tre lerta ulo de libera parolo kaj maliceta konsilo, nomita Erilangus. Tiu viro iam estis tre bela pafarkisto, pro kiu svatiĝdeziris pluraj riĉaj kampulinoj el la Lorĥregiono, sed li forpuŝis ĉiujn edzigemulinojn, kaj fariĝis ĉashundisto. Iam Pekopeno demandis lin pri la motivo, kaj Erilangus respondis: "Sinjoro, la hundoj havas sep specojn de rabio, la virinoj havas mil". Alian tagon, eksciinte pri la baldaŭa edziĝo de sia mastro, li sentime diris al li: "Sinjoro, kial vi edziĝas?" Pekopeno forpelis tiun serviston.

Tio povis maltrankviligi Pekopenon, ĉar Erilangus havis subtilan spiriton kaj longan memoron. Sed vero estas, ke tiu servisto iris al la markizo de Luzako, kie li fariĝis ĉef-

hundisto, kaj Pekopeno ne aŭdis plu pri li.

En la semajno antaŭ la geedziĝo Boldura ŝpinis en fenestroniĉo. Ŝia nano venis por averti ŝin, ke Pekopeno supreniras la ŝtuparon. Ŝi ekvolis kuri renkonte al sia fianĉo; kaj, dum ŝi levigis el sia seĝo, kiu havis rektan skulptitan dorsapogilon, ŝia piedo implikiĝis en la fadeno de ŝia ŝpinaĵo. Ŝi falis. La malfeliĉa Boldura sin restarigis. Ŝi sentis nenian doloron, sed ŝi memoris, ke iam simila akcidento okazis al kastelanino Liba, kaj ŝi sentis sian koron premita.

Pekopeno radia eniris, parolis al ŝi pri ilia geedziĝo kaj lia feliĉo, kaj la nubo, kiun ŝi havis en la animo, forflugis.

III. Kie estas klarigata la diferenco inter orelo de juna viro kaj orelo de maljunulo.

La morgaŭon de tiu tago Boldura ŝpinis en sia ĉambro, kaj Pekopeno ĉasis en la arbaro. Li estis sola, kaj havis kun si nur unu hundon. Sekvante la hazardon de la ĉasado, li alvenis apud farmodomo, kiu situis ĉe la enirejo de Sonn-arbaro kaj markis la limon inter la bienoj de Sonneck kaj de Falkenburg. Oriente, tiu farmodomo estis ombrata de kvar grandaj arboj, frakseno, ulmo, abio kaj kverko, kiujn oni nomis en la regiono la kvar Evangeliistoj. Laŭforme ili estis arboj-feoj. Precize kiam Pekopeno pasis sub ilia ombro, kvar birdoj estis sidantaj sur tiuj kvar arboj: garolo sur la frakseno, merlo sur la ulmo, pigo sur la abio kaj korvo sur la kverko. La kvar voĉoj de tiuj kvar plumhavaj bestoj miksiĝis en stranga maniero, kaj laŭmomente ŝajnis demandi kaj respondi. Krome aŭdiĝis virkolombo, kiun oni ne vidis, ĉar li estis en la arbaro, kaj kokino, kiun oni ne vidis, ĉar ĝi estis sur la birdokorto de la farmo. Je kelkpaŝa distanco tute kurba maljunulo aranĝis laŭlonge de muro trunkostumpojn por la vintro. Vidante Pekopenon proksimiĝi, li turniĝis kaj rektiĝis.

"Sinjor' kavaliro," li ekkriis. "Ĉu vi aŭdas, kion diras tiuj birdoj?"

"Bonulo," respondis Pekopeno. "Kiel tio min koncernas?"

"Sinjoro," reparolis la kampulo. "Por junulo la merlo fajfas, la garolo garolas, la pigo kriĉas, la korvo grakas, la kolombo kveras, la kokino klukas. Por maljunulo la birdoj parolas."

La kavaliro rideksplodis: "Nu, jen estas ja revaĵoj!"

La maljunulo serioze respondis: "Vi estas malprava, Sinjor' Pekopeno."

"Vi neniam vidis min," ekkriis la junulo. "Kiel vi scias mian nomon?"

"Ĝin diras la birdoj," respondis la kampulo.

"Vi estas maljuna frenezulo, bravulo!" diris Pekopeno. Kaj li preterpasis.

Ĉirkaŭ unu horon poste, trairante maldensejon, li aŭdis kornosonon, kaj li vidis belan trupon da rajdantoj aperi en la aro de altaj arboj. Tio estis la Palatina grafo, kiu iris al ĉaso akompanate de la burggrafoj, kiuj estis la grafoj de la kasteloj, de la vildgrafoj, kiuj estis la grafoj de la arbaroj, de la landgrafoj, kiuj estis la grafoj de la terbienoj, de la rejngrafoj, kiuj estis la grafoj de Rejno, kaj de la raŭgrafoj, kiuj estis la grafoj de la pugnoraĵto. Nobelo, rajdanto de la Pfalzgraf¹, nomita Gajrefrido, ekvidis Pekopenon, kaj kriis al li: "Bela ĉasisto, ĉu vi ne venos kun ni?"

"Kien vi iras?" diris Pekopeno.

"Bela ĉasisto," diris Gajrefrido. "Ni iras ĉasi milvon, kiu estas ĉe Hejmburgo, kaj detruas niajn fazanojn, ni iras ĉasi vulturon, kiu estas ĉe Vaŭgtsberg kaj ekstermas niajn tartaretojn*, ni iras ĉasi aglon, kiu estas ĉe Rejnŝtejn, kaj mortigas niajn kolombfalkojn². Venu kun ni!"

"Kiam vi revenos?" demandis Pekopeno.

"Morgaŭ," diris Gajrefrido.

"Mi sekvas vin," diris Pekopeno.

La ĉaso daŭris tri tagojn. La unuan tagon Pekopeno mortigis la milvon, la duan tagon Pekopeno mortigis la vulturon, la trian tagon Pekopeno mortigis la aglon. La Palatina grafo ekmiris pri tiel bonega arkapafisto.

"Kavaliro de Sonneck," li diris. "Mi donas al ci la feŭdon de Rejneck, dependan de mia turo de Gutenfels. Ci tuj sekvos min al Stahleck por ricevi la koncernan investadon kaj ĵuri la promeson de lojaleco al mi sur publika promenejo kaj kun ĉeesto de la skabenoj, **in mallo publico et coram scabinis**³, kiel diras la ĉartoj de la sankta imperi-

1. Palatin(a grafo) - N. de la tr. 2. fr. "émerillons" - N. de la tr.

3. Latina formulo ĵus antaŭe tradukita - N. de la tr.

estro Karlo la Granda.

Necesis obei. Pekopeno sendis al Boldura mesaĝon, per kiu li malgaje anoncis, ke la favora volo de la Pfalzgrafo devigas lin iri tuj al Stahleck por tre granda kaj tre grava afero.

"Estu trankvila, sinjorino karulino mia," li fine aldonis. "Mi revenos en la venonta monato."

Post foriro de la kuriero, Pekopeno sekvis la Palatinon, kaj iris kun la kavaliroj el la princa akompanantaro dormi en la malalta kastelmastrejo de Bañarañ. Tiun nokton li ricevis sonĝon. Li revidis en sonĝo la enirejon en la arbaron de Sonneck, la farmon, la kvar arbojn kaj la kvar birdojn. La birdoj nek kriis nek fajfis nek kantis, ili parolis. Ilia kantado, en kiu miksiĝis la voĉoj de la kokino kaj de la kolombo, estis ŝanĝita je stranga dialogo, kiun distinge aŭdis Pekopeno dormanta.

La garolo

"Kolomb' en la arbar' "

La merlo

"Kokino sur la korto
diradas: Pekopen' !

La garolo

"Kolomb' diras: Boldur' !

La korvo

"Vojiras la sinjor'."

La pigo

"Restas dam' en la tur' "

La garolo

"Ĉu li revenos de Alep'?"

La merlo

"Fes?"

La korvo

"Damanhur'?"

La pigo

"Ne, laŭ kokina veto, jes laŭ kolomba ĵur' "

La kokino
"Pekopen"! Pekopen!"

La kolombo
"Boldur"! Boldur"! Boldur!"

Pekopeno vekigis. Li havis malvarman ŝviton. En la unua momento li rememoris pri la maljunulo, kaj, ne sciante kial, li ekterurigis pro tiu songo kaj pro tiu dialogo. Poste li provis kompreni, poste li ne komprenis, poste li reekdormis, kaj la morgaŭon, kiam aperis la taglumo, kiam li revidis la belan sunon, kiu forpelas la fantomojn, disvaporigas la songojn kaj orumas la songojn, li ne pensis plu pri la kvar arboj nek pri la kvar birdoj.

IV. Kie estas traktate pri la diversaj kvalitoj propraj al diversaj ambasadoj ¹

Pekopeno estis nobelo de renomo, de raso, de sprito kaj de mieno. Enkondukite en la kortegon de la Pfalzgrafo kaj instalite en sia nova feŭdo, li tiom plaĉis al la Palatino, ke tiu inda princo iam diris al li: "Amiko, mi sendas ambasadon al mia kuzo de Burgonjo, kaj mi cin elektis kiel ambasadoron pro cia ĝentila renomo."

Pekopeno devis fari tion, kion volis lia princo. Alveninte en Diĵono, li tiel distingigis sin per sia bela parolo, ke iun vesperon la duko, malpleniginte tri grandajn glasojn da vino el Baĥaraĥ, diris al li: "Sinjoro Pekopeno, vi estas nia amiko. Mi havas kelkan akrabekan malkonsenton kun la sinjoro reĝo de Francio, kaj la Palatina grafo permesas, ke mi sendu vin al la reĝo, ĉar mi elektis vin kiel ambasadoron pro via granda raso²."

Pekopeno iris al Parizo. La reĝo tre aprecis lin, kaj iun tagon en aparto diris al li: "Nu, kavaliro Pekopeno, ĉar la Palatino pruntedonis vin al la Burgonjano por servi al Burgonjo, la Burgonjano ja pruntedonos vin al la reĝo de Francio por servo al la kristanaro. Mi bezonas tre nobelan sinjoron, kiu iru prezenti de mi kelkajn riproĉadmonojn al la miramoleno* de la maŭroj en Hispanio, kaj mi elektis vin kiel ambasadoron pro via bela sprito."

Oni povas rifuzi sian voĉon al la imperiestro, oni povas rifuzi sian edzinon al la papo; nenion oni rifuzas al la reĝo de Francio. Pekopeno vojiris al Hispanio.

En Granado la miramoleno mirinde lin akceptis, kaj invitis lin al la **zambras**³ de la Alhambro. Ĉiutage estis nur

1. ambasado signifas ĉi tie: ambasadora misio - N. de la tr.

2. nobeleco - N. de la tr.

3. festoj

festoj, turniroj kun bastonoj kaj lancoj, kaj ĉasado kun falkoj, kaj Pekopeno partoprenis kiel granda turniristo kaj ĉasisto, kia li estis. Kiel maŭro la miramoleno havis bonajn tartaretojn*, bonegajn sakeretojn* kaj admirindajn tunizianojn, kaj en tiuj ĉasadoj okazis plej belaj imageblaj flugpeladoj. Dume Pekopeno ne forgesis prizorgi la aferojn de la reĝo de Francio. Kiam la traktado estis finita, la kavaliro sin prezentis ĉe la sultano por lin adiaŭi.

"Mi akceptas vian adiaŭon, sinjoro kristano," diris la miramoleno, "ĉar vi tuj foriros al Bagdado."

"Al Bagdado!" ekkriis Pekopeno.

"Jes, kavaliro," reparolis la maŭra princo, "ĉar mi ne rajtas subskribi la traktaton kun la reĝo de Francio sen konsento de la kalifo de Bagdado, kiu estas komandoro de la kredantoj¹; mi devas sendi al la kalifo iun konsiderindan, kaj mi elektis vin kiel ambasadoron pro via bona mieno."

Kiam oni estas ĉe la maŭroj, oni iras, kien volas la maŭroj; ili estas hundoj kaj miskreduloj.² Pekopeno iris al Bagdado.

Tie li havis aventuron. Iun tagon, dum li pasis ĉe la piedoj de la muroj de l' serajlo, la preferata sultanino³ vidis lin, kaj ĉar li estis bela, malgaja kaj fiera, ŝi ekamis lin. Ŝi sendis al li nigran sklavinon, kiu parolis al la kavaliro en la ĝardeno de la urbo, apud granda tilio **microphylla** (malgrandfolia), kiun oni ankoraŭ tie vidas, kaj transdonis al li talismanon, dirante: "Tio ĉi venas de princo, kiu vin amas, kaj kiun vi neniam vidos. Konservu tiun talismanon. Tiel longe, kiel vi ĝin portos sur vi, vi restos juna. Kiam vi estos en mortdanĝero, tuŝu ĝin, kaj ĝi vin savos."

Pekopeno je ĉia hazardo akceptis la talismanon, kiu estis tre bela turkiso kun enĉizitaj nekonataj literoj. Li ligis ĝin al sia kolĉeno.

1. Religia estro de ĉiuj muzulmanoj, kvazaŭa papo de Islamo - N. de la tr.

2. Opinio de tiamaj kristanoj pri la muzulmanoj, kiuj reciproke same opiniis pri ili - N. de la tr.

3. edzino de la kalifo, rigardata kiel sultano

"Nun, sinjoro," aldonis la sklavinon deirante de li, "atentu pri tio ĉi: tiel longe, kiel vi havos tiun ĉi turkison ĉe via kolo, vi ne maljuniĝos je unu tago; se vi ĝin perdos, vi en unu minuto maljuniĝos je ĉiuj jaroj, kiujn vi lasis malantaŭe. Adiaŭ, bela ĝjaur*!"

Tion dirinte la negrino foriris.

Dume la kalifo estis vidinta la sklavinon de la sultano iri al la kristana kavaliro. Tiu kalifo estis tre ĵaluza kaj iome magiista. Li invitis Pekopenon al festo, kaj, kiam venis la nokto, li kondukis la kavaliron sur altan turon. Pekopeno senatente antaŭeniris tre proksime al la parapeto, kiu estis tre malalta, kaj la kalifo jene parolis al li: "Kavaliro, la Palatina grafo sendis cin al la duko de Burgojno pro cia nobla renomo, la duko de Burgonjo sendis cin al la reĝo de Francio pro cia granda raso, la reĝo de Francio sendis cin al la miramoleno de Grenado pro cia bela sprito, la miramoleno de Grenado sendis cin al la kalifo de Bagdado pro cia bona mieno; mi, pro cia nobla renomo, cia granda raso, cia bela sprito kaj cia bona mieno, sendas cin al la diablo!"

Prononcante tiun ĉi lastan vorton, la kalifo ekpuŝegis Pekopenon, kiu perdis la ekvilibron kaj falis de la alto de la turo.

V. Bona efiko de bona penso.

Kiam homo falas en abismon, terura fulmo estas tiu, kiu frapas lian okulon en tiu momento, kaj montras al li samtempe la vivon, el kiu li eliras, kaj la morton, en kiun li tuj eniros. En tiu lastega minuto Pekopeno konsternita sendis lastan penson al Boldura, kaj metis la manon al sia koro, tiel ke senpripense li tuŝis la talismanon. Apenaŭ li ektuŝetis per fingro la magian turkison, li sin sentis forportata kiel per flugiloj. Li ne falis plu, li ŝvebis. Li flugadis dum al tuta nokto. En la momento, kiam aperis la tago, la nevidebla mano, kiu lin subtenis, metis lin sur solecan sablejon ĉe marbordo.

VI. Kie oni vidas, ke eĉ la diablo mem malpravas esti trofrandema.

Nu, en tiu tempo mem okazis al la diablo malagraba stranga aventuro. La diablo kutimas forporti la animojn al li apartenantajn en dorskorbo, kiel oni povas vidi sur la portalo de la katedralo de Friburgo en Svisio, kie li estas figurita kun porka kapo sur la ŝultroj, hoko en la mano, kaj ĉifonista korbo sur la dorso, ĉar la demono trovas kaj kolektas la animojn de la malbonuloj en la rubamasoj metitaj de la homa speco ĉe la anguloj de ĉiuj grandaj veroj teraj kaj diaj. La diablo ne kutimis fermi la korbon, tial multaj animoj sin forsavis dank'al la ĉiela maliceto de la anĝeloj. La diablo tion ekvidis, kaj metis al la korbo bonan kovrilon provizitan per bona pendseruro. Sed la animoj, kiuj estas tre subtilaj, estis malmulte ĝenataj de la kovrilo, kaj, helpate per la ruzaj fingretoj de la keruboj, trovis ankoraŭ rimedon por forflugi tra la aĵuroj de la korbo. Tion vidinte, la diablo, tre spitita, mortigis dromedaron, kaj el la haŭto de ĝia ĝibo li faris felsakon, kiun li scipovis mirinde fermi helpe de demono Hermeso, kaj pri kiu, kiam ĝi estis plena de animoj, li sin sentis pli ĝoja ol studento pri monsaketo plena de ormoneroj.

Ordinare en Alta-Egiptio, ĉe la bordo de la Maro Ruĝa, post rondvizito tra la lando de paganoj kaj miskredantoj, la diablo plenigas sian felsakon. La loko estas tre dezerta. Ĝi estas sablobordo proksima de palmaro situanta inter Koma, kie naskiĝis Sankta Antonio, kaj Klisma, kie mortis Sankta Sizoeso.

Do iun tagon, kiam la diablo estis farinta ankoraŭ pli bonan ĉason ol kutime, li estis gaje pleniganta sian felsakon, kiam, hazarde turniĝante, li vidis je kelkpaŝa distanco anĝelon, kiu ridetante lin rigardas. La diablo skuis la ŝultrojn, kaj daŭrigis premeti en la sakon ĉiujn anim-

ojn, kiujn li havis, tre malmulte kontrolante ilin, mi ĵuras al vi, ĉar por tia kaldronego ĉio estas sufiĉe bona. Fininte li pugnekprenis la felsakon per unu mano por ĝin ŝargi sur siajn ŝultrojn, sed estis al li neeble levi ĝin de la tero, tiom da animoj li metis en ĝin, kaj tiom pezaj faris ilin la maljustaĵoj, per kiuj ili estis ŝargitaj. Tiam li ekkaptis per ambaŭ manoj tiun inferan sakon, sed la dua ekpeno estis tiel vana kiel la unua, la felsako ne pli moviĝis, ol se ĝi estus rokkapo elaperanta el la tero. "Ho plumbaj animoj!" diris la diablo, kaj li komencis blasfemi. Sin turnante li vidis la anĝelon, kiu ridante lin rigardas.

"Kion ci faras tie?" kriis la demono.

"Ci ja vidas," respondis la anĝelo. "Ĵus antaŭe mi ridetis, nun mi ridas."

"Ho ĉiela kortobirdo, granda simplulo ci!" rebatis Asmodeo¹.

Sed la anĝelo fariĝis severmiena, kaj jene parolis al li: "Drako, jen estas la vortoj, kiujn mi diras al ci komisie de tiu, kiu estas la Sinjoro: Ci ne povos forporti tiun ŝargon el animoj en gehenon, ĝis sanktulo el la paradizo aŭ kristano falinta de la ĉielo cin helpos por levi ĝin de la tero kaj meti ĝin sur siajn ŝultrojn."

Tion dirinte la anĝelo defaldis siajn aglajn flugilojn, kaj forflugis.

La diablo estis tre implikita.

"Kion intencas diri tiu stultulo?" li grumblis inter siaj dentoj. "Sanktulo el la paradizo? aŭ kristano falinta de la ĉielo? Mi longatempe atendos, se mi devos resti tie ĉi, ĝis tia helpo al mi venos! Kial diable mi tiel ekscese plenŝtopis tiun ĉi sakaĉon! Kaj tiu simplulo, nek homo nek birdo, kiu sin mokdistris pri mi! Nu, necesas nun, ke mi atendu la sanktulon, kiu venos el la paradizo, aŭ la kristanon, kiu falos de la ĉielo. Jen estas stulta historio, kaj estas ja konfesinde, ke oni amuziĝas per malmulto tie alte!"

Dum li tiel parolis al si mem, la loĝantoj de Koma kaj

1. Unu el la propraj nomoj de la diablo - N. de la tr.

de Klisma kredis aŭdi tondron surde grunti el la horizonto. Estis la diablo, kiu grumblis.

Por ĉaristo, kies ĉarradoj enmarĉiĝis, sakri estas io, sed eliĝi el la radkavo estas ankoraŭ pli bone. La kompatinda diablo cerbumis kaj revis. Tre lerta estas tiu, kiu pekigis Evan. Li ĉien eniras. Kiam li volas, same kiel li enŝoviĝas en la amon, li enŝoviĝas en la paradizon. Li konservis rilatojn kun Sankta Cipriano la magiisto, kaj scipovas laŭokaze bonvenigi sin de la aliaj sanktuloj, jen farante al ili malgrandajn misterajn servojn, jen dirante al ili afablajn vortojn. Li scias, tiu granda klerulo, la konversacion, kiu plaĉas al ĉiu. Li prenas ĉiun je lia malforta flanko. Li alportas al Sankta Roberto el Jorko bulkojn el avenfaruno kun butero. Li parolas pri oraĵarto kun Sankta Eliĝo kaj pri kuirarto kun Sankta Teodoro. Li parolas al la sankta episkopo Germano pri reĝo Hildeberto, kaj al la sankta abato Vandrilo pri reĝo Dagoberto, kaj al la sankta eŭnuko Usthazado pri reĝo Sapor. Li parolas al Sankta Paŭlo la Simpla pri Sankta Antonio, kaj li parolas al Sankta Antonio pri lia porko. Li parolas al Sankta Lupo pri lia edzino Pimeniola, kaj li ne parolas al Sankta Gomero pri lia edzino Gvinmaria. Ĉar la diablo estas la granda flatisto. Gala koro, miela buŝo.

Nu, kvar sanktuloj konataj pro sia intima amikeco, Sankta Nilo la Soleca, Sankta Austremomo, Sankta Johano la Nano kaj Sankta Medardo, precize en tiu tago iris kune promeni sur la bordo de la Maro Ruĝa. Kiam interparolante ili alvenis apud la palmaro, la diablo vidis ilin venantaj al li antaŭ ol li estis de ili ekvidata. Li tuj prenis al si la formon de malriĉa kaj tre kaduka maljunulo, kaj li ekkriis kompatinde. La sanktuloj proksimiĝis.

"Kio estas?" diris Sankta Nilo.

"Ho ve! ho ve! Miaj bonaj sinjoroj," ekkriis la diablo. "Venu helpi min, mi vin petegas. Mi havas tre kruelan mastron, mi estas malfeliĉa sklavo, mi havas tre kruelan mastron, kiu estas negocisto el la lando de Fes. Nu, vi scias, ke ĉiuj Fesanoj, maŭroj, numidoj, garamantoj kaj ĉiuj loĝantoj de Berberio, Nubio kaj Egiptio, estas mal-

bonaj, perversaj, inklinaj al virinoj kaj al nelicaj seksumoj, trorskemaj, rabemaj, hazardemaj kaj senkompataj kaŭze de la planedo Marso. Plie mia mastro estas homo turmentata de nigra galo, de flava galo kaj de pituito, de tio sekvas malvarma seka melankolio, kiu igas lin timema, nemulte kuraĝa, tamen kun multaj inventoj por malbono. Tio falas sur nin, malfeliĉajn sklavojn, sur min, kompatindan maljunulon..."

"Al kio vi intencas alveni, amiko?" interesite diris Sankta Aŭstremeno.

"Jen, mia bona sinjoro," respondis la demono. "Mia mastro estas granda vojaĝanto. Li havas maniojn. En ĉiu lando, en kiun li iras, li gustumas la plezuron konstrui en sia ĝardeno monton el sablo kolektita ĉe la bordoj de la maroj, apud kiuj tiu malbonulo instaligaŝ. En Zelando li starigis amason da ŝlima nigra sablo; en Frislando amason da dika sablo miksitita kun tiuj ruĝaj konkroj, inter kiuj troviĝas la tigre konuso; en la Cimbra Kersonozo⁴ nun nomata Jutlando, amason da maldika sablo miksitita kun blankaj konkroj, inter kiuj ne malofte oni trovas la sunleviĝantan japanan telinon..."

"La diablo cin forprenu!" interrompis Sankta Nilo, kiu estas de malpacienca naturo. "Venu al la fakto, jen kvaronon de horo ci perdigis al ni por aŭskulti frivolaĵojn. Mi kalkulas la minutojn."

La diablo humile kliniĝis. "Vi kalkulas la minutojn, sinjoro, tio estas nobla gusto. Vi verŝajne estas sudlandano, ĉar la sudanoj estas inĝeniaj kaj okupataj pri matematiko, tial ke ili estas, pli ol aliaj homoj, najbaraj al la cirklo de la vagantaj steloj." Poste, subite eksplodante per singultoj, kaj pugnobate kontuzante sian bruston: "Ho ve! miaj bonaj princoj, mi havas tre kruelan mastron. Por fari sian monton li trudas min ĉiutage, min maljunulon, pleniĝi per sablo tiun ĉi felsakon ĉe la marbordo. Mi devas transporti ĝin sur miaj ŝultroj. Kiam mi faris vojaĝon, mi rekomencas, kaj tio daŭras de la ektagiĝo ĝis la sunsubiro. Kiam mi faris vojaĝon, mi rekomencas,

4. Antikva nomo por Preskaŭinsulo aŭ Duoninsulo.

kaj tio daŭras de la ektagiĝo ĝis la sunsubiro. Se mi volas ekriposi, se mi volas ekdormi, se mi falas sub laceco, se la felsako ne estas tre plena, li skurĝigas min. Ho ve! mi estas ja tre mizera, tre batata, kaj tre premegata de kriplaĵoj. Hieraŭ mi faris ses vojaĝojn en la tago; kiam venis la vespero, mi estis tiel laca, ke mi ne povis levi ĝis mia dorso tiun ĉi sakon, kiun mi ĵus plenigis, kaj pasigis tie ĉi la tutan nokton plorante apud mia ŝarĝo, kaj terurite pro la kolero de mia mastro. Miaj sinjoroj, miaj bonaj sinjoroj, pro favoro kaj pro kompatato, helpu min meti tiun ĉi ŝarĝon sur miajn ŝultrojn, por ke mi povu reiri al mia mastro, ĉar, se mi malfruos, li mortigos min. Aj! aj!"

Aŭdante tiun kortuŝan alparoladon, Sankta Nilo, Sankta Aŭstremono kaj Sankta Johano la Nano sin sentis emociitaj, kaj Sankta Medardo ekploris, kio kaŭzis sur la tero kvardektan pluvadon¹.

Sed Sankta Nilo diris al la demono: "Mi ne povas helpi cin, amiko mia, kaj mi tion bedaŭras, sed necesus meti la manon al tiu ĉi felsako, kiu estas mortinta aĵo, kaj unu verso de la Tre Sankta Skribo malpermesas tuŝi mortintajn aĵojn, je puno resti malpura."

Sankta Aŭstremono diris al la demono: "Mi ne povas helpi cin, amiko mia, kaj mi tion bedaŭras, sed mi konsideras, ke tio estus bona ago, kaj la bonaj agoj havas tiun malavantaĝon, ke ili inklinigas al vanteco tiun, kiu faras ilin; tial mi min detenas de tia faro, por konservi la humilecon."

Sankta Johano la Nano diris al la demono: "Mi ne povas helpi cin, amiko mia, kaj mi tion bedaŭras. Sed kiel ci vidas, mi estas tiel malalta, ke mi ne povus atingi cian zonon. Kiel do mi povus meti tiun ŝarĝon sur ciajn ŝultrojn?"

Sankta Medardo diris al la demono: "Mi ne povas helpi cin, amiko mia, kaj mi tion bedaŭras; sed mi estas vere tiel emociita, ke mi havas la brakojn rompitaĵ."

Kaj ili daŭrigis sian vojiradon.

La diablo rabie koleriĝis. "Jen estas animaloj!" li ekkri-

1. Laŭ popola meteorologia proverbo, se pluvas dum la tago de Sankta Medardo, sekvas kvardektaga pluvado - N. de la tr.

is, rigardante la sanktulojn malproksimiĝi. "Kiaj maljunaj pedantoj! Ĉu ili estas absurdaj kun siaj longaj barboj! Mia honorvorto, ili estas eĉ pli stultaj ol la anĝelo!"

Kiam iu el ni koleras, li almenaŭ havas la eblon sendi al la diablo tiun, kiu lin incitas. La diablo ne havas tiun dolĉigan eblon. Tial en liaj koleroj estas pinto, kiu eniĝas en lin, kaj lin incitegas.

Dum li grumblis, fiksante sian okulon plenan de flamo kaj furiozo al la ĉielo, lia malamiko, jen li ekvidis en la nuboj nigran punkton. Tiu punkto dikigĝas, tiu punkto proksimiĝas; la diablo rigardas; tio estas homo, tio estas armita kaj kaskoporta kavaliro, tio estas kristano kun ruĝa kruco sur la brusto, kiu falas de la nuboj.

"Laŭdata estu kiu ajn!" ekkriis la demono saltante pro ĝojo. "Mi estas savita: jen venas al mi mia kristano. Mi ne povis venki kvar sanktulojn, sed estus ja diable, se mi ne venkus unu homon!"

En tiu momento Pekopeno, milde metata sur la bordon, metis piedon al tero.

Ekvidante la maljunulon, kiu tie sidas kiel sklavo ripozanta apud sia ŝarĝo, li iris al li, kaj diris: "Kiu vi estas, amiko? kaj kie mi estas?"

La diablo komencis kompatinde ĝemi. "Vi estas ĉe bordo de la Maro Ruĝa, mia sinjoro, kaj mi, mi estas la plej malfeliĉa el la mizeruloj."

Tiam li kantis al la kavaliro la saman rekantaĵon kiel al la sanktuloj, kaj konklude petegis, ke li helpu lin ŝarĝi tiun felsakon sur lian dorson.

Pekopeno skuis la kapon: "Bonulo, jen estas malmulte verŝajna historio."

"Mia bela sinjoro, kiu falas de la ĉielo, respondis la diablo, la via estas ankoraŭ malpli verŝajna, kaj tamen ĝi estas vera."

"Ĝuste", diris Pekopeno.

"Krome," respondis la demono, "kion mi povas pri tio? Se miaj malfeliĉoj ne havas bonan aspekton, ĉu pro kulpo

mia? Mi estas nur malriĉulo je havaĵo kaj sprito, mi ne scipovas inventi, ja necesas, ke mi konsistigu miajn ĝemadojn el miaj aventuroj, kaj mi povas meti en mian historion nur la veron. Kia viando, tia supo."

"Konsentite," diris Pekopeno.

"Kaj fine," daŭrigis la diablo, "kian malbonon tio povus kaŭzi al vi, juna viglulo, helpi kompatindan kriplan maljunulon por meti felsakon sur liajn ŝultrojn?"

Tio ŝajnis al Pekopeno konvinke decidiga. Li kliniĝis, levis de la tero la felsakon, kiu neniel rezistis, kaj, subtenante ĝin per siaj brakoj, li pretiĝis por meti ĝin sur la dorson de la maljunulo, kiu sin tenis klinita antaŭ li. Unu minuton plu, tio estus farita.

La diablo havas malvirtojn, estas tio, kio lin malprosperigas. Li estas frandavida. En tiu minuto li ekhavis la ideon kunigi la animon de Pekopeno al la animoj, kiujn li forportos; sed por tio necesis unue mortigi Pekopenon.

Li do mallaŭte elvokis nevideblan fantomon, al kiu li ion ordonis per malklaraj vortoj.

Ĉiu scias, ke, kiam la diablo dialogas kaj konversaciaj kun aliaj demonoj, li parolas ŝargonon duone italan, duone hispanan. Li ankaŭ diras jen kaj jen kelkajn latinajn vortojn.

Tio estas pruvita kaj klare fiksita en pluraj okazoj, kaj aparte en la proceso de doktoro Eŭgenio Torralva, kiu estis komencita en Valadolido la 10an de januaro 1528 kaj konvene finita la 6an de majo 1531 per la aŭtodafeo de la suprenomita doktoro.

Pekopeno multon sciis. Li estis, mi jam diris, sprita kavaliro, homo kapabla brave defendi tezon en vesperkunveno. Li estis beletristike klera, li konis la lingvon de la diablo.

Nu, en la momento, en kiu li metis la felsakon sur lian ŝultron, li aŭdis la klinitan maljunuleton mallaŭte diri: "Bamos, non cierra occhi, verbera, frappa, y echa la piedra."¹

Tio estis al Pekopeno kvazaŭ fulmo.

Suspekto al li venis. Li levis la okulojn, kaj li vidis, je granda alto super si, dikegan ŝtonon, kiun iu nevidebla giganto tenas pendanta super lia kapo.

Sin malantaŭen ĵeti, tuŝi per la maldekstra mano la talismanon, preni per la dekstra sian ponardon, kaj per ĝi trui la felsakon fortege kaj rapidege, tion faris Pekopeno, kvazaŭ li estus kirlovento, kiu en la sama sekundo pasas, flugas, turniĝas, brilas, tondras kaj fulmobatas.

La diablo eligis laŭtegan krion. La liberigitaj animoj forflugis tra la elirejo ĵus malfermita per la ponardo de Pekopeno, lasante en la felsako siajn nigraĵojn, siajn krimojn kaj siajn kruelaĵojn, malbelegan amason, abomenan verukon, kiu, pro la altiro propra al la demono, enkrustiĝis en lin, kaj, kovrite per la vila felo de la sako, restis por eterne fiksita inter liaj du ŝultroj. De tiu tago Asmodeo estas ĝiba.

Dume, en la momento, kiam Pekopeno sin ĵetis malantaŭen, la nevidebla giganto lasis fali sian ŝtonon, kiu trafis piedon de la diablo, kaj ĝin premegis. De tiu tago Asmodeo estas lama.

La diablo, kiel Dio, havas tondron je sia dispono; sed ĝi estas aĉege malsupra tondro, kiu eliĝas el la tero, kaj elradikigas la arbojn. Pekopeno sentis, ke la marbordo tremas sub li, kaj ke io terura lin envolvas; nigra fumo lin blindigis, timegiga bruo lin surdigis; al li ŝajnis, ke li falas, kaj rapide ruliĝas preskaŭ tuŝante la teron, kvazaŭ li estus morta folio pelata de la vento. Li eksvenis.

4. "Nu, ne fermu la okulojn, celu, frapu kaj ĵetu la ŝtonon."

N. de la tr.

VII. Amikaj proponoj de maljuna klerulo retiriĝinta en kabano el folioj.

Kiam li rekonsciiĝis, li aŭdis dolĉan voĉon, kiu diris "Fi sma", kio en araba lingvo signifas: "(Li estas) en la ĉielo." Li sentis, ke mano estas metita sur lia brusto, kaj li aŭdis alian voĉon malaltan kaj malrapidan, kiu respondis: "Lo, lo, maŝi mut", kio signifas: "Ne, ne, li ne estas mortinta." Li malfermis la okulojn, kaj li vidis maljunulon kaj junulinon genuantaj apud li. La maljunulo estis nigra kiel la nokto, li havis longan blankan barbon maldike plektitan laŭ la modo de la antikvaj magoj, kaj li estis vestita per ampleksa tuko el verda silkaĵo sen faldoj. La junulino estis ruĝkupro-kolora kun grandaj porcelanaj okuloj kaj koralaj lipoj. Ŝi havis orajn ringojn en la nazo kaj la oreloj. Ŝi estis ĉarma.

Pekopeno ne estis plu ĉe la marbordo. La infera blovo, hazarde lin pelante, lin ĵetis en valon plenan de rokoj kaj arboj strangformaj. Li ekstaris. La maljunulo kaj la junulino milde rigardis lin. Li proksimiĝis al unu el la arboj: la folioj kuntiriĝis; la branĉoj retiriĝis; la floroj, kiuj estis pale blankaj, iĝis ruĝaj; kaj la tuta arbo ŝajnis iel retroiri antaŭ li. Pekopeno rekonis la arbon de honto, kaj konkludis, ke li forlasis Hindion, kaj troviĝas en la fama lando de Pudiferan.

Tiam la maljunulo signis al li. Pekopeno sekvis lin; kaj, kelkajn momentojn poste, la maljunulo, la junulino kaj Pekopeno estis triope sidantaj sur mato en kabano farita el palmofolioj, kies interno, plena de ĉiaj gemoj, sparke brilas kiel arda braĝujo.

La maljunulo sin turnis al Pekopeno, kaj diris al li en germana lingvo: "Filo mia, mi estas la ĉionscianta homo, la etiopia ŝtonklerulo, la **taleb**⁴ de la araboj. Mi

⁴ klerulo - N. de la tr.

nomiĝas Zin-Eddin por la homoj kaj Evilmerodafî por la feoj. Mi estas la unua viro, kiu penetris en tiun ĉi valon, ĉi estas la dua. Mi pasigis mian vivon por rabi de la naturo la sciencon pri la aferoj, kaj por verŝi al la aferoj la sciencon de la animo. Dank'al mi, dank'al miaj lecionoj, dank'al la radioj dum cent jaroj falintaj de miaj pupiloj, en ĉi tiu valo la ŝtonoj vivas, la plantoj pensas, kaj la animaloj scias. Estas mi, kiu instruis al la bestoj la medicinon veran, kiu mankas al la homoj. Mi instruis al la pelikano sangeltiri el si mem por kuraci siajn idojn vunditajn de vipuroj, al la blinda serpento manĝi fenkolon por rericivi la vidkapablon, al la urso atakata de katarakto inciti la abelojn, por ke ili piku ĝiajn okulojn. Mi alportis al la aglinoj, kiuj estas mallargĝaj, la ŝtonon **oetites**, kiu igas ilin facile ovometi. Se la garolo sin laksigas per la laŭrofolio, la testudo per cikuto, la cervo per diktamno, la lupo per mandragoro, la apro per hedero, la turto per kelksino*; se la ĉevaloj ĝenataj per troa sango mem tranĉas al si vejnon ĉe la femuro; se la steliono⁴, en la epoko de haŭtŝanĝo, manĝas sian haŭton por sin kuraci de la kadukmalsano; se la hirundo kuracas la oftalmion de siaj idoj per la kalcedona ŝtono, kiun ĝi iras serĉi trans la maroj; se la mustelo sin provizas per ruto, kiam ĝi volas kontraŭbatali la kolubron, estas mi, filo mia, kiu ĉion ĉi instruis al ili. Ĝis nun mi havis nur animalojn por disĉiploj. Mi atendis homon. Ĉi venis. Estu mia filo. Mi estas maljuna. Mi lasos al ĉi mian kabanon, miajn gemojn, mian sciencon. Ĉi edzinigos mian filinon, kiu estas nomita Ajsaba, kaj kiu estas bela. Mi instruos al ĉi distingi la rubenon sandrastan disde la krizolampo², meti la perlamoton en salakvan poton, kaj reardigi la fajron de tro malbriliĝintaj rubenoj, trempante ilin en vinagron. Ĉiu tago en vinagro redonas al ili unu jaron da beleco. Ni milde pasigos nian vivon kolektante diamantojn kaj manĝante radikojn. Estu mia filo."

"Dankon, respektinda sinjoro," diris Pekopeno. "Mi ĝoje akceptas."

Kiam noktigiĝis, li forkuris.

4. lacerto.

2. = chrysolampis, gemo verŝajne simila al krizolito aŭ krizoprazo.

VIII. La vaganta kristano.

Li longatempe vojaĝis tra landoj. Diri ĉiujn vojaĝojn, kiujn li faris, estus rakonti pri la tuta mondo. Li marŝis nudpiede kaj kun sandaloj, li rajdis sur ĉiaj rajdobestoj, azeno, ĉevalo, mulo, kamelo, zebro, onagro* kaj elefanto. Li spertis ĉiajn marveturilojn kaj ĉiajn ŝipojn, la rondajn ŝipojn de Oceano kaj la longajn ŝipojn de Mediteraneo, **onenaria et remigia**,¹ galeron kaj galionon, fregaton kaj fregatonon, felukon, polakon kaj tartanon, barkon, barketon kaj barkerolon¹. Li sin riskis sur la lignaj karakoroj¹ de la hindianoj de Bantano kaj sur la ledaj ŝalupoj¹ de Eŭfrato, pri kiuj parolas Herodoto. Li estis batata de ĉiuj ventoj, de **levante-sirocco**³ kaj de **sirocco-mezzogiorno**⁴, de tramontano kaj de galerno. Li trairis Persion, Peguon, Bramazon, Tagatajon, Transianon, Sagistanon, Hasubion². Li vidis Monomotapon kiel Vincento-la-Blanka, Sofalon kiel Pedro Ordoñez, Ormuson kiel sinjoro de Fines, la sovaĝulojn kiel Akosta, kaj la gigantojn kiel Malherbo de Vitreo. Li perdis en la dezerto kvar piedfingrojn kiel Hieronimo Kostilja. Li sin vidis dek sep fojojn vendita kiel Mendez Pinto, estis punlaboristo kiel Tekseus, kaj riskis fariĝi eŭnuko kiel Parizolo. Li ricevis la frambezion, pro kiu mortas la negroj, la skorbuton, kiu timegigis Avicenon, kaj la marmalsanon, al kiu Cicerono preferis la morton. Li suprengrimpis montojn tiel altajn, ke atinginte la supron li vomis sangon, flegmon kaj galon. Li albordiĝis al la insulo, kiun iafoje oni renkontas ne serĉinte ĝin, kaj kiun neniam oni povas trovi ĝin serĉante, kaj li konstatis, ke vere la loĝantoj de tiu insulo estas bonaj kristanoj. En Midelpalio², kiu situas norde, li rimarkis kastelon en loko, kie ne estas kastelo, sed la eksterordinaraĵoj de la nordo estas tiel grandaj, ke pri tio oni ne devas miri. Li restadis plurajn monatojn ĉe la reĝo de Mogor Ekebas³, favore rigardate kaj karesate de tiu princo, pri kies kortego li poste rakon-

1. Nomoj de diversaj specoj de ŝipoj - N. de la tr.

2. La nomoj de landoj ŝajnas parte inventitaj de la aŭtoro, same kiel kelkaj nomoj de bestoj kaj plantoj - N. de la aŭtoro.

tis ĉion, kion de tiam metis en skriba formo la angloj, la holandanoj kaj eĉ la patroj jezuitaj. Li fariĝis klerega, ĉar li havis la du majstrojn de ĉiu doktrino: vojaĝon kaj malfeliĉon. Li studis la faŭnon kaj la flaŭron de ĉiuj klimatoj. Li observis la ventojn laŭ la migradoj de la birdoj kaj la marfluojn laŭ la migradoj de la cefalopodoj. Li vidis pasi en la submaraj regionoj la **ommastrephes sagittatus** iranta al la norda poluso kaj la **ommastrephes giganteus** iranta al la suda poluso. Li vidis la homojn kaj la monstrojn, kiel la antikva greko Odiseo. Li ekkonis ĉiujn mirindajn bestojn, la rosmaron, la nigran ralon, la solendguzon, la garagionojn similajn al maragloj, la junkvostulojn de la insulo Komoro, la urogalojn de Skotlando, la antenalajn, kiuj iras trupe, la alkatrazojn grandajn kiel anseroj, la moraksojn pli grandajn ol tiburonoj, la pejmonojn de la insuloj Maldivaj, kiuj manĝas homojn, la fiŝon manaron, kiu havas bovan kapon, la birdon klakion, kiu naskiĝas el iuj putrintaj lignoj, la malgrandan saruon, kiu kantas pli bele ol la papago, kaj fine la boraneton, la animal-planton de la tataraj landoj, kiu havas radikon en la tero kaj paŝtiĝas per la herbo ĉirkaŭ si. Li mortigis en ĉaso martrituron el la specio japlara, kaj li inspiris amon al rivera trituro el la specio baepapina. Iam, estante en insulo Monaro, kiu situas je ducent leŭgoj* de Goao, li estis vokita de fiŝistoj, kiuj montris al li sep homojn-episkopojn kaj naŭ sirenojn, kiujn ili kaptis en siaj retoj. Li aŭdis la noktan bruon de la mara forĝisto, kaj li manĝis el la cent kvindek tri specoj de fiŝoj, kiuj vivas en la maro, kaj kiuj troviĝis ĉiuj en la retoj de la apostoloj, kiam ili fiŝkaptis laŭ ordono de la Sinjoro. En Skitio li truis per sagoj grifon, kontraŭ kiun la arimaskaj popoloj militis por havigi al si la oron, kiun tiu besto gardis. Tiuj popoloj volis fari lin reĝo, sed li sin forsavis. Fine li apenaŭ ne ŝippereis en multaj okazoj, aparte proksime de la kabo Gardafuo, kiun la antikvuloj nomis **Promontorum Aromatorum** kaj tra tiom da aventuroj, da erarvagoj, da lacigoj, da heroaĵoj, da laboroj kaj da mizeroj, la brava kaj fidela kavaliro Pekopeno havis nur unu celon, trovi Germanion; nur unu esperon, reveni en Falkenburgon; nur unu penson, revidi Bolduran.

3. levantena siroko.

4. tagmeza (suda) siroko.

Dank'al la talismano de la sultanino, kiun li ĉiam portis sur si, li povis, oni memoras, nek maljuniĝi nek morti.

Li tamen malgaje kalkulis la jarojn. En la epoko, kiam li fine sukcesis atingi la nordon de la franca lando, pasis kvin jaroj, de kiam li lastafoje revidis Bolduran. Kelkfoje li revis pri tio, post kiam li vojiris depost la ektagiĝo. Li sidigis sin sur ŝtono ĉe la vojborde, kaj li ploris.

Poste li revigliĝis kaj kaj rekuraĝiĝis. "Kvin jaroj," li pensis, "jes, sed mi fine ŝin revidos. Ŝi estis dekkvinjara, nu, ŝi estos dudekjara."

Liaj vestoj estis ĉifonoj, liaj piedvestoj estis ŝiritaj, liaj piedoj sangis; sed forto kaj ĝojo estis al li revenintaj, kaj li reekmarŝis.

Tiel li atingis la Vogeajn montojn.

IX. Kie oni vidas, per kio povas amuziĝi nano en arbaro.

Iun vesperon, post kiam li marŝadis la tutan tagon tra rokoj, serĉante pasejon por malsupreniri al Rejno, li alvenis ĉe la enirejo de arbaro el abioj, fraksenoj kaj aceroj. Li senhezite penetris en ĝin. Li marŝis jam pli ol unu horon, kiam subite la pado, kiun li sekvis, perdiĝis en maldensejo prisemita de ileksoj, juniperoj kaj sovaĝaj frambujoj. Apud la maldensejo estis marĉo. Elĉerpote de laceco, mortante pro malsato kaj soifo, tute senfortigite, li rigardis ĉi tien kaj tien, serĉante dometon, karbistan kabanon aŭ fajron de paŝtisto, kiam subite aro da tadornoj pasis preter li, movante la flugilojn kaj kriante. Pekopeno ekremetis, rekonante tiujn strangajn birdojn, kiuj faras siajn nestojn subtere, kaj kiujn la Vogeza kampuloj nomas anas-kunikloj. Li flanken disŝovis la ileksajn tufojn, kaj vidis ĉiuflanke flori kaj verdi en la herbejo la kritmon⁴, la angelikon, la heleboron kaj la grandan gencianon. Dum li kliniĝis per certigi pri tio, lian rigardon frapis mitula konko falinta sur la herbotapiŝo. Li ĝin levprenis. Ĝi estis unu el tiuj mituloj de Volonjo, kiuj enhavas perlojn dikajn kiel pizoj. Li levis la okulojn. Super lia kapo ŝvebis gufo.

Pekopeno komencis maltrankviliĝi. Oni konfesos, ke estis motivo por tio. Tiuj ileksoj kaj frambujoj, tiuj tadornoj, tiuj magiaj herboj, tiu mitulo, tiu gufo, ĉio ĉi estis malmulte trankviliga. Li estis do tre timkonfuzita kaj sin demandis kun angoro, kie li estas, kiam malproksima kanto venis ĝis li. Li atente aŭskultis. Ĝi estis voĉo raŭka, trema, ĉagrena, malagrabla, kune surda kaj kriaĉa, kaj jen estas tio, kion ĝi kantis:

Mia laget' generas, en l'ombro ĝin ŝirmanta,
La ridan Amfitritan kaj la nigran Neptunon.
Laget' humila nutras, sur montoj nekonataj,
Imperiestron Neptunon, reĝinon Amfitritan.

Mi estas nano, avo de gigantoj,
Mia akvaro produktas du oceanojn.

El rokoj tuŝetataj de neniŭ flugilo,
Mi verŝas bluan fluon por ŝi, verdan fluon por li.
El grot', en kiu neniŭ fajro brulas, mi ellasas
Verdan riveron por li, bluan riveron por ŝi.

Mi estas nano, avo de gigantoj,
Mia akvaro produktas du oceanojn.

Fajna smeraldo kuŝas en mia flava sablo,
Pura safir' kaŝiĝas en humida juvelujo.
Mia smerald' fandita iĝas la bela Rejno,
Mia safir' solviĝas, fluas, faras Rodanon.

Mi estas nano, avo de gigantoj,
Mia akvaro produktas du oceanojn.

Pekopeno ne povis plu dubi. Kompatinda laca vojaĝanto, li troviĝis en la fatala arbaro de Perditaj Paŝoj. Ĝi estas vasta arbaro plena de labirintoj, enigmoj, dedalaĵoj, kie promenas la nano Rulono. La nano Rulono loĝas ĉe lago en Vogezoj, sur la supro de monto; kaj tial, ke de tie li sendas unu rivereton al Rodano kaj alian al Rejno, tiu fanfarona nano sin pretendas la patro de Mediteraneo kaj Atlankiko. Lia plezuro estas vagadi en la arbaro, kaj tie erarigi la pasantojn. Vojaĝanto enirinta en la arbaron de Perditaj Paŝoj neniam eliras el ĝi.

Tiu voĉo, tiu kanto, estis la kanto kaj la voĉo de la malica nano Rulono. Pekopeno konsternegita sin ĵetis vizaĝalteren.

"Ho ve!" li ekkriis. "Estas finite, neniam mi revidos Bolduran."

"Tamen jes," diris iu apud li.

X. Equis canibusque ¹

Li rerektiĝis. Maljuna sinjoro vestita per belega ĉaskostumo staris antaŭ li je kelkpaŝa distanco. Tiu nobelo estis komplete ekipita. Lian kokson batis tranĉilego kun grifelita ora tenilo, kaj de lia zono pendis ĉaskorno farita el korno de bubalo inkrustita per stano. Estis io nedifineble stranga, svaga kaj lumeca en tiu pala vizaĝo ridetanta en la lasta helo de la krepusko. Tiu maljuna ĉasisto tiel aperinta subite en tia loko, je tia horo, certe estus ŝajninta stranga al vi kiel al mi, sed en la arbaro de Perditaj Paŝoj oni pensas nur pri Rulono. Tiu maljunulo ne estis nano, kaj tio sufiĉis al Pekopeno.

Cetere la bonulo havis mienon gracian, malkaŝan kaj afablan. Krome, kvankam kostumita kiel senŝanceliga ĉasisto, li estis tiel maljuna, tiel eluzita kaj kurbadorsa, tiel rompita, havis la manojn tiel falditaj kaj tiel malfortikaj, la brovojn tiel blankaj kaj la kruroj tiel malgrasaj, ke timi lin estus kompatinde. Lia rideto, ĉe pli ĝusta ekzameno, estis la banala kaj senprofunda rideto de stulta reĝo.

"Kion vi deziras de mi?" demandis Pekopeno.

"Cin redoni al Boldura," respondis la maljuna ĉasisto, daŭre ridetante.

"Kiam?"

"Pasigu nur unu nokton en ĉaso kun mi."

"Kiun nokton?"

"La komenciĝantan."

"Kaj mi revidos Bolduran?"

1. Ĉevaloj kaj hundoj (latine) - N. de la tr.

"Kiam nia ĉasnokto estos finita, je la sunleviĝo, mi cin metos antaŭ la pordon de Falkenburgo."

"Nokte ĉasi, ĉu?"

"Kial ne?"

"Sed estas tre strange."

"Ba!"

"Sed estas tre lacige."

"Ne."

"Sed vi estas ja tre maljuna."

"Ne maltrankviliĝu pri mi."

"Sed mi estas laca, sed mi marŝis la tutan tagon, sed mi estas morta pro malsato kaj soifo," diris Pekopeno. "Mi eĉ ne povus rajdi."

La maljuna sinjoro deligis de sia zono arĝente damaskenitan kukurbobotelon, kiun li prezentis al li: "Trinku tion ĉi."

Pekopeno avide metis la kukurbon al siaj lipoj. Apenaŭ glutinte kelkajn plengorĝojn, li sin sentis revigligita. Li estis juna, forta, vigla, potenca. Li estis dorminta, manĝinta, trinkinta. Al li ŝajnis eĉ jen kaj jen, ke li tro trinkis.

"Nu!" li diris. "Ni marŝu, kuru, ĉasu la tutan nokton, mi konsentas, sed mi ja revidos Bolduran?"

"Tuj post paso de ĉi nokto, je la sunleviĝo."

"Kaj kiun garantion pri via vorto vi donos al mi?"

"Mian ĉeeston mem. La helpon, kiun mi havigas al ci. Mi povus lasi cin morti tie ĉi pro malsato, laceco kaj mizero, forlasi cin al la promenanta mano de l' lago Rulono, sed mi kompatis al ci."

"Mi sekvos vin," diris Pekopeno. "Dirite, je sunleviĝo en Falkenburgo."

"Hola, vi! elvenu, al ĉaso!" kriis la maljuna sinjoro, penante per sia kaduka voĉo.

Ĵetante tiun krion al la arbaro, li sin turnis, kaj Pekopeno vidis, ke li estas ĝiba. Poste li faris kelkajn paŝojn, kaj Pekopeno vidis, ke li estas lama.

Je la alvoko de la maljuna sinjoro, el la arbardensaĵo eliris trupo da rajdantoj vestitaj kiel princoj kaj surĉevalitaj kiel reĝoj.

Ili venis kaj sin ordigis en profunda silento ĉirkaŭ la maljunulo, kiu ŝajnis esti ilia mastro. Ĉiuj estis armitaj per tranĉilo aŭ pikstango; li sola havis ĉaskornon.

Estis jam noktiĝinte, sed ĉirkaŭ la nobeloj staris ducent servistoj portantaj ducent torĉojn.

"Ebbene," diris la mastro, **"ubi sunt los perros?"** ⁴

Tiu miksaĵo el itala, latina kaj hispana lingvoj estis malagrabla al Pekopeno.

Sed la maljunulo malpacience reparolis: "La hundoj! la hundoj!"

Apenaŭ li finis, teruraj bojadoj ekplenigis la maldensaĵon. En ĝi ĵus aperis ĉashundaro.

Admirinda ĉashundaro: vera imperiestra hundaro. Ilin per kondukŝnuroj fortike tenis servistoj kun flava jako kaj ruĝaj ŝtrumpoj, armitaj lakeoj de hundejo kun kruelega vizaĝo, kaj tute nudaj negroj.

Neniam estis pli kompleta hundo-koncilio. Tie troviĝis ĉiaj eblaj hundoj, kuplitaj kaj dividitaj po grupoj kaj taĉmentoj, laŭ la rasoj kaj instinktoj.

La unua grupo konsistis el cent dogoj el Anglio kaj cent leporhundoj kun dek du paroj da tigro-hundoj kaj dek du paroj da baŭd-hundoj*.

La dua grupo estis tute konsistanta el halthundoj el Berberio, blankaj kun ruĝaj makuletoj, bravaj hundoj, kiuj ne timas pro la bruoj, restas tri jarojn en sia boneco, inklinas kuri al la ĉasbestoj, kaj servas por la granda ĉaso.

La tria grupo estis legio da norvegaj hundoj, vulpokoloraj hundoj kun rufeta hararo, kun blanka makulo sur la frunto aŭ sur la kolo, kiuj havas bonan nazon kaj gran-

4. "Nu! kie estas la hundoj?" - N. de la tr.

dan kuraĝon, kaj al kiuj plaĉas precipe la cervoĉaso; grizaj hundoj kun leopardaj markoj sur la dorso, kiuj havas krurojn kun sama harkoloro kiel la kruroj de leporo, aŭ ruĝe kaj nigre striaj. La elekto estis bonega. Inter tiuj hundoj estis neniu bastardo. Pekopeno, kiu estis spertulo, ne vidis inter la vulpkoloraj unu, kiu estus flava aŭ grize markita, nek inter la grizaj unu, kiu estus argentkolora aŭ kun rufaj kruroj. Ĉiuj estis aŭtentaj kaj bonaj.

La kvara grupo estis potencega; ĝi estis dika svarmo, densa kaj profunda, el tiuj potencaj nigraj dogoj de la abatejo de Sankta Aŭberto en Ardeno, kiuj havas mallongajn krurojn kaj ne kuras rapide, sed ĝeneras tre timegindajn spurĉashundojn, kaj tre furioze ĉasas la aprojn, la vulpojn kaj la fetorajn bestojn. Kiel la norvegaj, ĉiuj estis bonrasaj kaj veraj hundoj-nobeloj, kaj evidente estis suĉintaj la lakton proksimen de la koro; ili havis kapon mezdimensian, pli longan ol platan, faŭkon nigran, ne ruĝan, larĝajn orelojn, kurbajn koksojn, fortmuskolan lumbon, larĝajn krurojn, belforman femuron, rektan subgenuon, kun vosto dika proksime de la lumbo kaj svelta aliloke, kun raspa subventra felo, fortaj ungegoj, sekaj piedoj en formo de vulpa piedo.

La kvina grupo estis orientdevena. Kredeble ĝi kostis grandegajn monsumojn, ĉar en ĝin oni metis nur hundojn de Palimbatra, kiuj mordas la taŭrojn, hundojn de Cintiki, kiuj atakas la leonojn, kaj hundojn de Monomotapo, kiuj apartenas al la gvardio de la imperiestro de Hindio.

Cetere ĉiuj, anglaj, berberaj, norvegaj, ardenaj kaj hindaj, kriegis abomeninde. Homa parlamento ne farus pli bone.

Pekopeno estis admire blindigita de tiu hundaro. Vekiĝis ĉiuj liaj apetitoj de ĉasisto. Tamen ĝi venis de oni-ne-sciis kie, kaj li ne povis sin deteni diri al si mem, ke estas strange, ke tiel bojegante ĝi ne estis aŭdita antaŭ ol vidita.

La ĉefservisto, kiu kondukis tiun tutan hundaron, staris je kelkpaŝa distanco de Pekopeno, kun la dorso turnita. Pekopeno iris al li por lin demandi, kaj metis manon sur lian ŝultron. La servisto sin turnis; li estis maskita.

Tio mutigis Pekopenon. Li eĉ tre serioze sin demandis,

Ĉu li ja sekvas tiun ĉason, kiam la maljunulo venis al li.

"Nu, kavaliro, kion ci diras pri niaj hundoj?"

"Mi diras, mia bela sinjoro, ke por sekvi tiel terurajn hundojn, necesus teruraj ĉevaloj."

La maljunulo, sen respondo, metis al sia buŝo arĝentan fajfilon, kiu estis fiksita ĉe la malgranda fingro, antaŭzorgo de bongusta homo, kiu riskas spekti tragedion, kaj li fajfis.¹

Je la fajfo ekbruis inter la arboj, la ĉeestantoj flankeniĝis, kaj kvar stalistoj en skarlata servistkostumo subite aperis, kondukante du belegajn ĉevalojn.

Unu estis bela ĝineto*, de majstra irmaniero, kun hufkorno glata, dubenigra, alta, ronda, bone formita, kun pasternoj mallongaj, preskaŭ rektaj kaj preskaŭ lune kurbaj, kun antaŭkruraj suproj sekaj kaj nervaj, kun genuoj senkarnaj kaj bone artikigitaj. Ĝi havis la krurojn de bela cervo, la bruston larĝa kaj bone elvolvita, la dorson grasa, duobla kaj tremanta.

La alia estis tatara kurĉevalo kun dikega postaĵo, longa trunko, flankoj bone glataj, brila felkoloro. Ĝia kolo, de meza arkoformo, sed ne tro volba, estis vestita per vasta peruko flirtanta kaj krispeta. Ĝia vosto bele dika pendis ĝistere. Ĝi havis la haŭton de la frunto kvazaŭ kudrita sur siaj dikaj sparkobrilaj okuloj, la buŝon granda, la orelojn malkvietaj, la naztruojn malfermitaj, stelon sur la frunto, du blankajn harmakulojn sur la kruroj, sian kuraĝon floranta kaj sepjara aĝon.

La unua havis la kapon vestita per kapkirasos², brustkirasojn kun blazono kaj militan selon.

La dua estis malpli fiere, sed pli bele jungvestita. Ĝi portis arĝentan mordajon, orumitajn rozkokardojn, orumitajn bridrimenojn, reĝan selon, brokatan ĉabrakon, pendantajn kvastojn kaj ŝanceliĝan plumtufegon.

Unu huffrapadis, bravumis, ronkis, rongiŝis sian mordajon,

1. *Viktor Hugo, romantika dramisto, mallasitis la klasikajn tragediojn*

2. Ornamata peco, kiu ŝirmas la kapon de la ĉevalo inter la oreloj kaj la nazo - N. de la tr.

rompis la ŝtonojn kaj postulis militon. La alia rigardis ĉiuflanken, serĉis aplaŭdojn, gaje henis, kaj tuŝetis la teron per la ekstremaĵo de la hufo, reĝumis kaj mirinde paradis. Ambaŭ estis nigraj kiel ebono. Pekopeno, kun okuloj preskaŭ frenezaj pro admiro, rigardadis la du mirindajn bestojn.

"Nu," diris la sinjoro lametante kaj tusante, kaj daŭre ridetante, "kiun ci elektas?"

Pekopeno ne plu hezitis, kaj saltis sur la ĝineton.

"Ĉu ci bone sidas sur la selo?" kriis la maljunulo.

"Jes," diris Pekopeno.

Tiam la maljunulo rideksplodis, deŝiris per unu mano la jungaĵon, la plumtufegon, la selon kaj la ĉabrakon de la tataro ĉevalo, per la alia mano ekkaptis ĝian kolhararon, eksaltegis kiel tigro, kaj nudfele ekrajdis sur la belega besto, kiu tremis per siaj tutaj membroj. Poste, preninte la kornon de sia zono, li eksonoris tiel timegindan fanfaron, ke Pekopeno surdigita kredis, ke tiu terura maljunulo havas tondron en sia brusto.

XI. Kion oni riskas rajdante sur ĉevalo, kiun oni ne konas.

Ĉe la bruo de tiu korno la arbaro eklumiĝis en siaj profundoj per mil eksterordinaraj lumoj, ombroj pasis tra la arboj, malproksimaj voĉoj ekkriis: "El al ĉaso!", la hundaro bojis, la ĉevaloj snufis, kaj la arboj tremetis kiel pro forta vento.

En tiu momento fendetita sonorilo, simila al ŝafbleko en la mallumo, sonoris noktomezon.

Je la dek-dua bato la maljuna sinjoro duafoje albuŝigis sian eburan kornon, kaj la servistoj deligis la hundaron. La hundoj ellasitaj ekkuris kvazaŭ plenmano da ŝtonoj ŝetataj de balisto, krioj kaj kriegoj duoble intensiĝis, kaj ĉiuj ĉasistoj kaj ĉiuj ĉevalistoj kaj ĉiuj hundistoj kaj la maljunulo kaj Pekopeno ekgalopis.

Galopo kruda, fortega, rapida, brilega, kapturna, supernatura, kiu kaptis Pekopenon, lin forportis, kaj resonigis en lia cerbo ĉiujn paŝojn de la ĉevalo, kvazaŭ lia kranio estus la pavimo de la vojo, galopo, kiu lin blindigis kiel fulmo, lin ebriigis kiel orgio, lin ekscitegis kiel batalo; galopo, kiu en momentoj fariĝis kirlego, kirlego, kiu en momentoj fariĝis uragano.

La arbaro estis nemezureble vasta, la ĉasistoj estis nenombreblaj, maldensejoj sekvis maldensejojn, la vento lamentis, la dornaĵoj siblis, la hundoj bojis, la kolosa nigra silueto de cervego kun deksesbranĉaj kornoj intermite aperis tra la branĉaĵo, kaj fuĝis en la duonombro kaj en la helaĵoj, la ĉevalo de Pekopeno terure blovis, la arboj sin klinis por vidi tiun ĉason pasi, kaj malantaŭen sin rerenversis, post kiam ili vidis ĝin, terurigaj fanfaroj intermite eksonegis, poste ili subite silentis, kaj oni aŭdis en malproksimo la kornon de la maljuna ĉasisto.

Pekopeno ne sciis, kie li estas. Galopante apud ruino

ombrata de abioj, inter kiuj kaskado falegis de la supro de granda muro el porfiro, li kredis trovi la kastelon de Nideck. Poste li vidis ĉe sia maldekstro montojn rapide kurantajn, kiuj ŝajnis al li esti la Malaltaj Vogezoj. Li rekonis sinsekve laŭ la formoj de iliaj kvar suproj la Banonde-la-Roko, la Kampon-de-la-Fajro, la Klimonton kaj la Ungersbergon. Momenton poste li estis en la Altaj Vogezoj. En la daŭro de malpli ol kvaronhoru, lia ĉevalo traŭris Giromanjon, Rotabakon, Sultzon, Barenkopfon, Graŭsonon, Bresuaron, alton de Honco, monton de Luro, Kapon-de-l'Urso, grandan Dononon kaj grandan Ventronon. Tiuj vastaj suproj aperis el li miksite en la mallumo, sen ordo kaj sen kunligo; ŝajne iu giganto malordegigis la grandan Alzacan montoĉenon. Jen kaj jen li kredis distingi sub si la lagojn, kiujn Vogezoj portas sur siaj suproj, kvazaŭ tiuj montoj pasus sub la ventro de lia ĉevalo. Tiel li vidis sian ombron reflektatan en la Bano-de-l'Paganoj kaj en la Salto-de-l'Kuvoj, en la Lago Blanka kaj en la Lago Nigra. Sed li vidis ĝin, kiel la hirundoj vidas sin tuŝetante la spegulon de la lagoj, ĝi malaperis tiel rapide, kiel ĝi aperis. Dume, kiel ajn stranga kaj frenezeca estis tiu kurado, li sin trankviligis metante la manon al sia talismano, kaj pensante, ke entute li ne malproksimiĝas de Rejno.

Subite lin envolvis densa nebulo, la arboj en ĝi fandiĝis kaj perdiĝis, la bruo de la kurado pliintensiĝis en tiu mallumo, kaj lia ĝineto ekgalopis kun nova forto. La nebulo estis tiel densa, ke Pekopeno apenaŭ distingis la orelojn de sia ĉevalo streĉe starantajn antaŭ li. En tiel teruraj momentoj, estas sendube granda peno, kaj certe granda merito, ĵeti sian animon ĝis Dio kaj sian koron ĝis sia amatino. Tion faris devote la brava kavaliro. Li do pensis pri la bona Dio kaj pri Boldura, eble iom pli pri Boldura ol pri la bona Dio, kiam ŝajnis al li, ke la lamentado de la vento fariĝas kiel voĉo, kaj klare prononcas jenan vorton: Hejmburg. Kaj en tiu momento dika torĉo portata de iu ĉevalisto tralumis la nebulon. Kaj, per la heligo de tiu torĉo Pekopeno vidis pasi super lia kapo milvon truitan de sago, kaj tamen flugantan. Li volis rigardi tiun birdon, sed lia ĉevalo eksaltis, la milvo ekmovis la flugilojn, la torĉo enprofundiĝis en la arbaron, kaj Pekopeno refalis en la nokton.

Kelkajn momentojn poste la vento ree parolis, kaj diris: "Vaŭgtsberg", nova lumo iluminis la nebulon, kaj Pekopeno ekvidis tra la mallumo vulturon, kies flugilo estas traborita de ŝetlanko, kaj kiu tamen flugas. Li malfermis la okulojn por vidi, li malfermis la buŝon por krii; sed antaŭ ol li sendis sian rigardon, antaŭ ol li ŝetis sian krion, la eklumo, la vulturo kaj la ŝetlanko estis malaperintaj. Lia ĉevalo eĉ ne unu minuton malpli rapidis, kaj kun mallevita kapo impetegis tra ĉiuj ĉi fantomoj, kvazaŭ ĝi estus la blinda ĉevalo de la demono Pafos aŭ la surda ĉevalo de reĝo Sizimordakus.

La vento triafoje ekkriis, kaj Pekopeno aŭdis tiun veas voĉon diranta: "Rejnŝtejn". Tria eklumo purpurigis la arbojn en la nebulo, kaj pasis tria birdo. Ĝi estis aglo kun sageto en la ventro, kaj tamen fluganta. Tiam Pekopeno rememoris pri la ĉaso de la Pfalzgrafo, en kiun li lasis sin kuntreni, kaj li ekstremetis. Sed la galopo de la ĝineto estis tiel freneza, la arboj kaj la malprecizaj objektoj de la nokta pejzaĝo tiel haste forfuĝis, la rapido de ĉio estis tiel mirinde grandega ĉirkaŭ Pekopeno, ke eĉ en li mem nenio povis halti. La ŝajnoj kaj la vizioj sin sekvis tiel konfuze, ke li eĉ ne povis fiksi sian penson sur siajn malgajajn rememorojn. La ideoj pasis tra lia kapo kiel la vento. Oni daŭre aŭdis en malproksimo la bruon de la ĉaso, kaj jen kaj jen la monstra cervo de la nokto blekis en la densejoj.

Iom post iom disiĝis la nebulo. Subite la aero fariĝis varmeta, la formo de la arboj ŝanĝiĝis, korkokverkoj, pistakarboj, Alep-pinoj aperis tra la rokoj, larĝa blanka luno ĉirkaŭata de grandega haloo funebre lumigis la erikojn. Tamen ne estis tago de plena luno. Kurante sur la fundo de fosvojeto, Pekopeno kliniĝis kaj deŝiris de la vojranda deklivo manplenon da herbo. Je la lunlumo li ekzamenis tiujn plantojn, kaj rekonis kun angoro la vundosanigan antilidon de Cevenoj, la fadenforman veronikon kaj la altan ferolon, kies malbelegaj folioj finiĝas per ungegoj. Duonhoron poste la vento estis ankoraŭ pli varma, mi ne scias kiaj miraĝoj de maro iaforte plenigis la intervalojn de la arbegaroj; li ree kurbiĝis al la bordo de la vojeto, kaj denove deŝiris la unuajn plantojn, kiujn lia mano renkontis. Ĉi-foje estis la arĝenta citizo de

Seto, la stela anemono de Nico, la mara lavatero* de tulono, la **geranium sanguineum**¹ de la Malaltaj Pireneoj, tiel facile rekonebla per sia kvinloba folio, kaj la **astrantia major**, kies floro estas suno radiantanta tra ringo kiel la planedo Saturno. Pekopeno vidis, ke li foriĝas de Rejno kun terura rapido; li trakuris pli ol cent leŭgojn* inter la du manplenoj da herboj, trairis Vogezojn, trairis Cevenojn, nun trairas Pireneojn. "Prefere morton," li pensis, kaj li ekvolis ĵeti sin malsupren de sia ĉevalo. Ĉe la movo, kiun li faris por sin elseligi, li sentis siajn piedojn premataj kiel per du feraj manoj. Li rigardis. Liaj piedingoj kaptis kaj tenas lin: ili estis vivantaj piedingoj.

La malproksimaj krioj, la henadoj kaj bojadoj furiozis; la korno de la maljuna ĉasisto, antaŭiranta la ĉasistaron je timeginda distanco, sonis malbonsignajn melodiojn; kaj tra grandaj dubebluaj branĉaĵoj skuataj de la vento, Pekopeno vidis la hundojn tranaĝi lagetojn plenajn de magiaj rebriloj.

La kompatinda kavaliro rezignaciis, fermis la okulojn, kaj lasis sin forporti.

Unu fojon li remalfermis ilin; forneca varmo de tropika nokto frapis lian vizaĝon; sovaĝaj blekegoj de tigroj kaj de ŝakaloj venis ĝis li; li duonvidis ruinojn de pagodoj, sur kies tegmentoj staris laŭ longaj vicoj seriozmienaj vulturoj, filozofoj kaj cikonioj; arboj de strangefektaj formoj havis en la valoj mil strangajn ŝtarteniĝojn; li rekonis la banjanon kaj la baobabon; la **oué-nonbouï** fajfis, la **ojra-rameum** zumkantetis, la eta gonambuko kantis. Pekopeno estis en arbaro de Hindio.

Li fermis la okulojn. Poste li denove malfermis ilin. En kvarono de horo, la ekvatorajn blovojn sekvis glacia vento. La malvarmo estis terura. La hufo de la ĉevalo kriigis la prujnon. La rangiferoj, la alkoj kaj la satirusoj kuris kiel ombroj tra la nebulo. La akreco de la arbaroj kaj de la montoj estis angoriga. Ĉe la horizonto estis nur du aŭ tri rokegoj de nemezurebla alto, ĉirkaŭ kiuj flugis grizaj mevoj kaj sterkorarioj,² kaj tra malbelegaj nigraj herbaĵoj oni duonvidis grandajn blankajn ondojn, al kiuj la ĉielo

1. Sangruĝa geranio. 2. Rabmevoj - N. de la tr.

ĵetis neĝoflokojn, kaj kiuj ĵetis al la ĉielo ŝaŭmoflokojn. Pekopeno trakuris la larikojn de Biarnio, kiuj estas ĉe la Kabo Norda.

Momenton poste plidensiĝis la nokto. Pekopeno nenion plu vidis, sed li aŭdis teruran bruegon, kaj li ekkonis, ke li pasas proksime de la kirlabismo Malstromo, kiu estas la Tartaro de la antikvuloj kaj la umbiliko de la maro.

Kiu do estis tiu terura arbaro, kiu ĉirkaŭas la tutan teron?

La cervo kun dek ses kornobranĉoj jen kaj jen reaparis, daŭre fuĝante kaj daŭre pelate. La ombroj kaj la konfuzaj bruoj mikse kunimpetis sur ĝia spuro, kaj la korno de la maljuna ĉasisto superonis ĉion, eĉ la bruon de la abismo Malstromo.

Subite la ĝineto haltis. La bojado ĉesis, ĉio ĉirkaŭ Pekopeno eksilentis. La malfeliĉa kavaliro, kiu jam antaŭ unu horo refermis la okulojn, remalfermis ilin. Li estis antaŭ la fasado de malhela kolosa konstruaĵo, kies lumigitaj fenestroj ŝajnis ĵeti rigardojn. Tiu fasado estis nigra kiel masko kaj vivanta kiel vizaĝo.

XII. Priskribo de fia loĝejo.

Kio estis tiu konstruaĵo, estas malfacile direble. Ĝi estis domo fortika kiel citadelo, citadelo belega kiel palaco, palaco minaca kiel kaverno, kaverno muta kiel tombo. En ĝi oni aŭdis neniun voĉon, oni vidis neniun ombron.

Ĉirkaŭ tiu kastelo, kies grandego havis mi-ne-scias kion supernaturan, la arbaro etendiĝis ĝis nevideblo.

Ne estis plu luno super la horizonto. En la ĉielo oni ekvidis nur kelkajn stelojn ruĝajn kiel sango.

La ĉevalo estis haltinta ĉe la piedo de perono, kiu finiĝis ĉe granda fermita pordo. Pekopeno rigardis dekstren kaj maldekstren, kaj al li ŝajnis, ke li distingas laŭlonge de la fasado aliajn peronojn, malsupre de kiuj sin tenas senmove aliaj rajdantoj haltintaj kiel li, kaj ŝajnantaj atendi en silento.

Pekopeno eltiris sian ponardon; kaj li estis fraponta per la tenilo la marmoran balustradon de la perono, kiam subite, proksime de la kastelo, probable malantaŭ la fasado, eksonegis la korno de la maljuna ĉasisto, potenca, sonora, monstra, surdiga kiel la klariono plena de fulmotondro, en kiun blovas la malica anĝelo. Tiu korno, kies bruo videble kurbigis la arbojn, kantis en la mallumo timegindan mortsonadon.⁴

La korno eksilentis. Apenaŭ ĝi estis fininta, kiam la pordoj de la kastelo eksteren malfermiĝis ambaŭklape, kvazaŭ elinterne ventego fortege puŝis ilin ĉiujn kune. Tra ili eliris lumfluo.

La ĝineto supreniris la ŝtupojn de la perono, kaj Pekopeno eniris en vastan halon belege iluminatan.

4. Korna melodio anoncanta, ke la cervo, tute ĉirkaŭsieĝata de la hundoj, estas tuj mortigota.

La muroj de tiu halo estis kovritaj de tapetoj figurantaj temojn ĉerpitajn el la romana historio. La interspacoj de la paneloj estis tegitaj per cipresligno kaj eburo. Supre laŭlongis galerio plena de floroj kaj arboj, kaj en angulo sub rotundo oni vidis lokon por virinoj pavimitan per agato. La cetero de la pavimo estis mozaiko reprezentanta la Trojan militon.

Cetere, neniu; la halo estis senhoma. Nenio pli sinistra ol tiu granda helo en tiu granda soleco.

La ĉevalo, kiu iris propramove, kaj kies paŝado solene sonis sur la pavimo, trairis malrapide tiun unuan halon, kaj eniris en duan ĉambregon same iluminatan, same vastegan kaj same senvivan.

Largaj paneloj el skulptita cedroligno ĉirkaŭtegis tiun ĉambron, kaj en tiuj paneloj iu mistera artisto estis enkadriginta mirindajn pentraĵojn inkrustitajn per perlamoto kaj oro. Ili estis bataloj, ĉasoj, festoj reprezentantaj kastelojn plenajn de fajrartaĵoj sieĝatajn kaj prenatajn de faŭnoj kaj sovaĝuloj, turnirojn kaj marbatalojn kun ĉiaj ŝipoj kurantaj sur oceano el turkisoj, smeraldoj kaj safiroj, kiuj admirinde imitis la ondojn de la sala akvo kaj la ŝvelon de la maro.

Sub tiuj pentraĵoj friso farita per plej delikata kaj majstra ĉizilo figuris en la nenombreblaj rilatoj, kiujn ili havas inter si, la tri specojn de teraj kreitaĵoj, kiuj enhavas spiriton, nome la gigantoj, la homoj kaj la nanoj; kaj ĉie en tiu verko la gigantoj kaj la nanoj humiligis la homon, kiu estas pli malgranda ol la gigantoj kaj pli malsprita ol la nanoj.

Tamen la plafono ŝajnis fari mi-ne-scias kian malicetan omaĝon al la homa genio. Ĝi estis tute konsistanta el bareliefoj apudmetitaj, en kiuj brilis, lumigataj per malhela fajro kaj kapvestitaj per Plutaj kronoj, la portretoj de ĉiuj homoj, al kiuj la tero ŝuldas eltrovojn taksitajn kiel utilaj, kaj kiuj pro tiu motivo estas nomataj bonfarintoj al la homaro. Ĉiuj estis tie pro la invento, kiun li faris. Arabus estis tie pro la medicino, Dedalo pro la labirintoj, Pisistrato pro la libroj, Aristotelo pro la bibliotekoj, Tubal-Kaino pro la amboŝoj, Moseo pro la

korno, Amfiktiono pro la diveno de la songoj, Frederiko Barbaroso pro la falkoĉaso, kaj sinjoro Baŝu, lionano, pro la kvadrato de la cirklo. En la anguloj de la volbo kaj de la pendentivoj grupiĝis, kiel la ĉefkonstelacioj de tiu ĉielo el homaj steloj, multaj famegaj vizaĝoj: Flavius, kiu eltrovis la kompason, Kristoforo Kolumbo, kiu eltrovis Amerikon, Botargus, kiu imagis la kuirsaŭcojn, Marso, kiu inventis la militon, Faŭstus, kiu inventis la presarton, la monaĥo Ŝvarc, kiu inventis la pulvon kaj papo Ponciano, kiu inventis la kardinalojn.

Pluraj el tiuj famaj personoj estis nekonataj de Pekopeno, pro la granda kialo, ke ili ankoraŭ ne estis naskitaj en la epoko, en kiu okazis ĉi tiu historio.

Tiel la kavaliro, irante, kien kondukis lin la paŝado de lia ĉevalo, penetris en longan vicon da belegaj ĉambregoj. En unu el ili li rimarkis sur la orienta muro jenan surskribon el oraj literoj: "La **kaŭe**¹ de la Araboj, alie nomita **kave**, estas herbo, kiu abunde kreskas en la imperio de la Turko, kaj estas nomata en Hindio la mirakla herbo, preparita laŭ jena recepto: prenu duonuncon de tiu herbo, kiun vi pulvorigos kaj infuzos en pindo da ordinara akvo tri aŭ kvar horojn; poste vi ĝin boligas, tiel ke estu el ĝi triono konsumita. Trinku ĝin iom post iom, kvazaŭ enspirante. La altrangaj personoj ĝin dolĉigas per sukero kaj aromigas per ambro." Fronte, sur la okcidenta muro, brilis jena alia surskribo: "La greka fajro fabrikiĝas, kaj ekscitiĝas en akvo, el karbo de salika ligno, salo, brando, sulfuro, peĉo, incenso kaj kamforo, kiu eĉ sola brulas en akvo sen alia miksaĵo, kaj konsumas ĉian materion."

En alia ĉambrego estis kiel unika ornamo la portreto tre ĝuste simila de tiu lakeo, kiu dum la festeno de Trimalciono marŝadis ĉirkaŭ la tablo prikantante per delikata voĉo la saŭcojn, en kiuj enestas benzoo.

Ĉie torĉingoj, lustroj, kandeloj kaj multbranĉaj kandel-
ingoj, reflektataj de grandegaj speguloj el kupro kaj ŝtalo, brilegis en tiuj ĉambregoj senmezuraj kaj riĉegaj, en kiuj Pekopeno renkontis neniun vivantan estaĵon, kaj tra kiuj li antaŭeniris kun frenezaj okuloj kaj malserena spirito, sola, maltrankvila, konsternegita, plena de tiuj neesprimeblaj

1. Kafo.

kaj konfuzaj ideoj, kiuj venas al revuloj en la mallumo de arbaroj.

Fine li alvenis antaŭ pordo el duberuĝa metalalojo, super kiu rondis, en foliaro el gemoj, dika ora pomo; kaj sur tiu pomo li legis jenajn du liniojn:

ADAMO INVENTIS LA MANĜON

EVA INVENTIS LA DESERTON.

XIII. Kia gastejo, tia gastotablo.

Dum li penis enprofundiĝi en la veaspekte ironian signifon de tiu surskribo, la pordo malrapide malfermiĝis, la ĉevalo eniris; kaj Pekopeno estis kiel homo abrupte pasanta de la tagmeza sunhelo en kelon.

La pordo refermiĝis malantaŭ li, kaj la loko, en kiun li ĵus penetris, estis tiel malluma, ke en la unua momento li sin kredis blindiĝinta. Li nur duonvidis je kelka distanco larĝan palan helon. Iom post iom liaj okuloj blindigitaj per la supernatura lumo de la antaŭĉambroj, kiujn li ĵus trairis, alĉutimiĝis al la mallumo, kaj li komencis distingi kvazaŭ en vapo la mil monstrajn pilierojn de tiu babilona ĉambrego. La helo en la mezo de tiu ĉambro ekricevis konturojn, en ĝi desegniĝis fromoj, kaj post kelkaj momentoj la kavaliro vidis elvolviĝi en la mallumo, en la mezo de aro da tordaj kolonoj, grandan tablon livide lumatan per sepbranĉa kandelingo, ĉe kies pintoj tremis kaj flirtetis sep bluaj flamoj.

Ĉe la alta ekstremo de tiu tablo, sur trono el verda oro, sidis giganto el bronzo, kiu estis vivanta; tiu giganto estis Nimrodo; ĉe lia dekstro kaj liaj maldekstro sidis sur foteloj el fero amaso da kunmanĝontoj palaj kaj silentaj, unuj kapvestitaj per maŭromoda ĉapo, aliaj pli kovritaj de perloj ol la reĝo de Bisnagaro.

Pekopeno rekonis tie ĉiujn famajn ĉasistojn, kiuj lasis spuron en la historioj: reĝo Mitrohazano, la tirano Mañanidas, la romana konsulo Aemilius Barbula la Dua; Rollo, reĝo de la maro; Zuentiboldo Melinda, la malinda filo de la granda Arnolfo, reĝo de Loreno; Haganono, favorato de Karolo de Francio; Herberto, grafo de Vermandozo; Vilhelmo Stupokapo, grafo de Potevo¹, fondinto de la famiga familio Malgracia-najbaro; papo Viatalianus; Fardulfus,

1. Poitiers, urbo en okcidenta Francio - N. de la tr.

abato de Sankta-Dionizio; Atelstano, reĝo de Anglio; kaj Ajgrolodo, reĝo de Danio. Apud Nimrodo sin tenis kubut-apoge la granda Ciro, kiu fondis la Persan Imperion dum mil jarojn antaŭ Jesuo-Kristo, kaj portis sur la brusto sian blazonon, kiu estas, kiel oni scias, de sinoplo kun arĝenta leono sen malnoblaĵo, kronita per ora laŭro kun rando krenelita de oro kaj geŭlo, ŝargita de ok trilobaj folioj kun arĝenta pedunklo⁴.

Tiu tablo estis priservita laŭ la imperia etiketo, kaj ĉe la kvar anguloj sidis kvar distingindaj famegaj ĉasistinoj, nome: reĝino Emma; reĝino Ogiva, patrino de Ludoviko la Transmara; reĝino Gerberga, kaj Diana, kiu, pro sia kvalito de diino, havis baldakenon kaj pendseruron kiel la tri reĝinoj.

Neniu el tiuj kunsidantoj mangiŝis, neniu parolis, neniu rigardis. Meze de la tablotuko estis larĝa malplena loko, kiu ŝajnis atendi, ke oni servu la mangon, kaj sur la tablo staris nur flakonoj, en kiuj brilegis mil trinkaĵoj el plej diversaj landoj, palmovino el Hindio, rizovino el Bengalio, distilita akvo el Sumatro, la arako el Japanio, la pampulso el la ĉinoj kaj la peŝmezo de la turkoj.

Tie kaj ĉi tie, en riĉe emajlitaj kruĉegoj el argilo, ŝaŭmis tiu trinkaĵo, kiun la norvegoj nomas **uel**, la gotoj **buska**, la karintoj **vo**, la sklavonoj **oll**, la dalmatoj **brieŭ**, la hungaroj **ser**, la bohemoj **piva**, la poloj **pvo**, kaj kiun ni nomas biero.

Negroj similaj al demonoj, aŭ demonoj similaj al negroj, ĉirkaŭis la tablon, starante, mute, kun buŝtuko sur la brako kaj verŝilo en la mano. Ĉiu sidanto havis laŭkonvene sian nanon apud si, Sinjorino Diana havis sian leporhundon.

Atente rigardante en la profundon plej nebulan de tiu eksterordinara loko, Pekopeno vidis, ke en la eble senfunda vastego de la ĉambrego, sub la kolonaro, estis multego da spektantoj, ĉiuj rajde sidantaj kiel li, ĉiuj en

⁴. En heraldika lingvaĵo: sur verda fono, blanka leono sen seksorgano, ktp. Geŭlo = ruĝo, sinoplo = verdo, oro = flavo, arĝento = blanko, lazuro = bluo, sablo = nigro - N. de la tr.

ĉaskostumo; ombroj pro la mallumo, statuoj pro la senmoveco, fantomoj pro la silento. Inter la plej proksimaj li kredis rekoni tiujn rajdintojn, kiuj akompanis la maljunan ĉasiston en la arbaro de la Perditaj Paŝoj. Kiel mi ĵus diris, sidantoj, servistoj, spektantoj gardis timegindan silenton, kaj pli ol aŭdi spirblovon eliri el tiu homamaso, oni aŭdus flustri la ŝtonojn de tombo.

En tiu mallumo estis tre malvarme. Pekopeno estis ĝisoste frostigita; tamen li sentis ŝviton flui sur ĉiuj liaj membroj.

Subite eksplodis bojoj, komence malproksimaj, baldaŭ fortegaj, ĝojaj kaj sovaĝaj. Poste la korno de la maljuna ĉasisto abrupte enmiksiĝis, kaj eksonis, kun triumfa bel-ego, admirinda mortsonado, perfekte stranga kaj nova, kiu, plurajn jarcentojn poste, reinventite de Rolando de Lattro en nokta inspiro, havigis al tiu granda muzikisto, la 5an de aprilo 1574, la honoron esti farata de papo Gregorio la Dek-tria, kavaliro de Sankta Petro kun ora sprono de **numero participantium**⁴.

Je tiu bruo Nimrodo levis la kapon, abato Fardulfus duone deturniĝis, kaj Ciro, apogite sur la dekstra kubuto, sin apogis sur la maldekstra kubuto.

4.: el la nombro de la partoprenantoj.

XIV. Nova maniero por fali de sur ĉevalo.

La bojoj kaj la korno proksimiĝis; granda pordo, fronta al tiu, tra kiu eniris Pekopeno, ambaŭklape malfermiĝis, kaj la kavaliro vidis alveni en longa malluma galerio la ducent torĉoportantajn servistojn subtenantajn sur siaj ŝultroj grandegan pladon el verda oro, sur kiu kuŝis, meze de vasta saŭco, la cervo kun dek ses kornobranĉoj rostita, dubenigra kaj fumanta.

Antaŭe de la servistoj, kies ducent torĉoj ruĝis kiel braĝo, marŝis la maljuna ĉasisto kun sia bubalkorno en la mano, rajdante sur la tataro ĉevalo malseka de ŝaŭmo; li ne blovis plu en sia korno; sed li ĝentile ridetis meze de la malordinaraj kriegoj de la hundaro eskortanta la cervon, kaj daŭre kondukata de la maskita ĉefhundisto.

En la momento, en kiu tiu eskorto eliris el la galerio, kaj eniris en la ĉambregon, la torĉoj de la servistoj bluiĝis, kaj la hundoj subite eksilentis. Tiuj teruraj hundoj kun faŭkoj de leonoj kaj blekegoj de tigroj antaŭeniris sekvante sian mastron per malrapidaj paŝoj, kun mallevita kapo, kun la vosto premita inter la kruroj, kun la lumbo tremanta de profunda teruro, kun petegantaj okuloj al la tablo, ĉe kiu sidis la misteraj kunuloj, daŭre palaj, kun senemocia mieno, mornaj kiel marmoraj vizaĝoj.

Alveninte apud la tablo, la maljunulo fronte rigardis la funebraspektajn sidantojn, kaj ekridegis: "**Hombres y mugeres, or ĉa vosotros, belle signore, domini et dominae, amigos mios, comment va la besogne?**"⁴

"Ci venas tre malfrue," diris la bronza viro.

⁴ "Viroj kaj virinoj, nu! vi belaj sinjoroj kaj sinjorinoj, amikoj miaj, kiel iras la laboro?" - N. de la tr.

"Tial ke mi havis amikon, al kiu mi volis montri la ĉason," respondis la maljunulo.

"Jes," rebatis Nimrodo, "sed rigardu."

Samtempe, etendante la dikfingron de sia dekstra mano super sia bronza ŝultro, li signis malantaŭ si la fundon de la ĉambrego. La okulo de Pekopeno aŭtomate sekvis la indikan geston de la giganto, kaj li vidis en malproksimo desegniĝi sur la nigraj muroj dubebblankajn ogiv-ojn, kvazaŭ tie estus fenestroj konfuze frapataj de la unuaj heloj de la ektagiĝo.

"Nu!" reparolis la ĉasisto, "necesas urĝi."

Kaj, je signo de li, la ducent torĉoportantoj, helpataj de la negroj, pretiĝis por meti la rostitan cervon sur la tablon, ĉe la piedo de la sepbranĉa kandeligo.

Tiam Pekopeno enigis la spronojn en la flankojn de la ĝineto, kiu lin obeis, strange, eble pro la proksimiĝo de la tago, kiu malfortigas la sorĉojn. Li pelis sian ĉevalon inter la servistojn kaj la tablon, sin starigis rekte sur la piedingoj, metis la glavon en sian manon, fikse rigardis laŭvice la sinistrajn vizaĝojn ĉe la granda tablo kaj la maljunan ĉasiston, kaj ekkriis per tondra voĉo: "Pro Dio, kiuj ajn vi estas, spiritoj, fantomoj, ŝajnaĵoj kaj vizioj, imperiestroj aŭ demonoj, mi malpermesas, ke vi faru paŝon, aŭ, pro la morto, kaj Dio min helpu, mi instruos al vi ĉiuj, eĉ al ci, la homo el bronzo, kiom pezas sur la kapo de fantomo la fera piedvesto de vivanta kavaliro! Mi estas en la kaverno de la ombroj, sed mi pretendas fari en ĝi, laŭ mia fantazio kaj plaĉo, realajn kaj terurajn aferojn! Ne enmiksiĝu en tio, miaj majstroj! Kaj ci, kiu mensogis al mi, maljuna fiulo, ci ja povas elingigi la glavon kiel junulo, ĉar ci blovas en cia korno kun pli da impetego ol taŭro! Metu cin do en singardo, aŭ, pro la meso! mi tranĉos al ci la lumbon tra la ventro, eĉ se ci estus reĝo Pluto mem!"

"Ha, jen estas vi, kara mia," diris la maljunulo. "Nu, vi noktomanĝos kun ni."

La rideto akompananta tiun gracian inviton incitegis Pekopenon.

"Gardu cin, maljuna fripono! Ha! ci faris al mi promeson, kaj ci trompis min!"

"Hijo⁴, atendu la finon. Kion ci scias pri tio?"

"Gardu cin, mi rediras."

"Ja, mia bona amiko, ci malbone ricevas la aferojn."

"Redonu al mi Bolduran, ci tion promesis al mi!"

"Kiu diris al vi, ke mi ne redonos ŝin? Sed kion vi faros el ŝi, kiam vi ŝin revidos?"

"Ŝi estas mia fianĉino, tion ci ja scias, mizerulo! kaj mi ŝin edzinigos," diris Pekopeno.

"Kaj tio estos, probable post mallonga tempo, unu plia malgaja kaj malfeliĉa paro," respondis la maljuna ĉasisto skuante la kapon. "Cetere, ba! kiel tio min koncernas? Necesas, ke la aferoj estu tiaj. La malbona ekzemplo estas donata de la maskloj kaj femaloj de ĉi-malsupre de la masklo kaj la femalo de tie supre, la suno kaj la luno, kiuj konsistigas malŝatindan paron, kaj neniam estas kune."

"Ho he! ĉesigu la mokadon," ekkriis la kavaliro, "aŭ mi cin ekstermos, kaj mi ekstermos tiujn ĉi demonojn kaj iliajn diinojn, kaj mi laksige purigos al ili tiun ĉi kavernon!"

La maljunulo respondis kun rido de ĵonglisto: "Laksigu, mia amiko, jen estas la recepto, senao, rabarbo kaj Epsom-salo. La senao balaas la stomakon, la rabarbo purigas la duodenon, la Epsom-salo skrapas la intestojn."

Pekopeno furioze impetis al li kun la glavo levita, sed apenaŭ lia ĉevalo faris paŝon, li sentis ĝin ekstremitaj kaj sinki. Li rigardis. Malvarma kaj blanka radio de taglumo penetris en la kavernaĉon kaj glitis sur la bluiĝintaj pavimeroj. Krom la maljuna ĉasisto daŭre ridetanta kaj senmova, ĉiuj ĉeestantoj komencis malaperi. La kandelingoj kaj la torĉoj estingiĝis, la okuloj de la fantomoj, momente reanimitaj per la abrupta parolatako de Pekopeno, ne plu havis rigardon; kaj tra la dikega bronza torso de la giganta Nimrodo kvazaŭ tra botelego el vitro, Pekopeno

4. Hispane : filo - N. de la tr.

klare distingis la pilierojn de la fundo de la ĉambrego.

Lia ĉevalo fariĝis nepalpebla, kaj malrapide fandiĝis sub li. La piedoj de Pekopeno proksimiĝis al la tero.

Subite kriis koko. Estis mi-ne-scias kio terura en tiu klara, metaleca, vibranta kanto, kiu traboris la orelon de Pekopeno kiel klingo el stalo. En la sama momento freŝa vento ekblovis, la ĉevalo neniigis sub li, li ŝanceliĝis, kaj apenaŭ ne falis. Kiam li restariĝis, ĉio estis malaperinta.

Li troviĝis sola, staranté sur la tero, kun la glavo en la mano, en ravino obstrukciita de erikoj, je kelkpaŝa distanco de akvo ŝaŭmanta en la rokoj ĉe la pordego de malnova kastelo. Li levis la okulojn, kaj eligis ĝojkrion. Tiu kastelo, ĝi estis la Falkenberga.

XV. Kie oni vidas, kiun retorikan figuron plej volonte uzas la bona Dio.

La koko duafoje kriis. Ĝia kanto venis de la birdokorto de la kastelo. Tiu koko, kies voĉo ĵus forvaporigis ĉirkaŭ Pekopeno la kapturnoplenan palacon de la noktaj ĉasistoj, eble en tiu sama nokto bekpiketis la panpecetojn, kiuj falis ĉiuvespere de la benitaj manoj de Boldura.

Ho potenco de la amo! Nobla riĉeco de la koro! Varma radiado de la belaj pasioj kaj de la belaj aĝojaroj! Apenaŭ Pekopeno estis revidinta tiujn amegatajn turojn, la freŝa kaj blindiga bildo de lia fianĉino aperis al li, kaj pleningis lin per lumo, kaj li sentis, ke en li forsolvigas kiel fumo ĉiuj estintaj mizeraj, kaj la ambasadoj, kaj la reĝoj, kaj la vojaĝoj, kaj la fantomoj, kaj la timegiga abismo de vizioj, el kiu li eliĝis.

Certe ne tiel, kun alte levita kapo kaj flama rigardo, la kronita pastro, pri kiu temas en la **Speculum historiale**, elmergiĝis el la mezo de fantomoj, post kiam li vizitis la malluman kaj belegan internon de la bronza drako. Kaj ĉar tiu timinda figuro ĵus aperis al la rakontanto de ĉi tiu historio, konvenas ĵeti al ĝi malbenon, kaj ĉi tie trudi malhonoran signon al tiu falsa saĝulo, kiu havis du vizaĝojn, unu turnitan al la helo, alian al la ombro, kaj kiu estis samtempe por Dio papo Silvestro la Dua kaj por la diablo magiisto Gerberto. Fronte al perfiduloj kaj duoblaj personoj, malamo estas devo. Pasante ĉiu Parizano ŝuldas ŝtonon al Perinet-Leclerc, ĉiu Hispano al grafo Juliano, ĉiu kristano al Judaso kaj ĉiu homo al Satano.⁴

Cetere, ni ne forgesu, Dio ĉiam metas lumon apud nokto, bonon apud malbono, anĝelon apud demono. La severa instruo de la Providenco rezultas de tiu eterna

4. Perinet-Leclerc, grafo Juliano: nomoj de perfiduloj verŝajne famaj, sed pri kiuj la teksto ne donas precizajn informojn - N. de la tr.

kaj supernobla antitezo. Ŝajnas, kvazaŭ Dio senĉese dirus: Elektu. En la dek-unua jarcento, fronte al la kabalista pastro Gerberto, li lokis la ĉastan kaj kleran Emuldus. La magiisto estis papo, la sankta doktoro estis kuracisto. Tiel la homoj povis vidi sub la sama ĉielo inter la samaj okazaĵoj kaj en la sama epoko la blankan sciencan sub la nigra sutano kaj la nigran sciencan sub la blanka sutano.

Pekopeno remetis sian glavon en la ingon, kaj per grandaj paŝoj marŝis al la kastelo, kies fenestroj, jam gajigitaj per sunradio, ŝajnis redoni al la ektagiĝo ĝian rideton.

Dum li proksimiĝis al la ponto, de kiu nun restas nur unu arko, li aŭdis malantaŭ si voĉon, kiu diris al li: "Nu, kavaliro de Sonneck, ĉu mi tenis mian promeson?"

**XVI. Kie estas traktata la demando,
ĉu oni povas rekonu iun, kiun oni ne konas.**

Li sin turnis. Du viroj estis starantaj en la erikoj. Unu estis la maskita ĉefhundisto; kaj Pekopeno, lin vidante, ekstremetis. Li portis sub sia brako grandan ruĝan paperujon. La alia estis maljuna malalta viro, ĝiba, lama kaj tre malbela. Estis li, kiu parolis al Pekopeno, kaj Pekopeno provis rememori, kie li vidis tiun vizaĝon.

"Mia nobelo," reparaolis la ĝibulo, "ĉi do ne rekonas min?"

"Jes ja," diris Pekopeno.

"Bone!"

"Vi estas la sklavo de la bordoj de la Maro Ruĝa."

"Mi estas la ĉasisto de la arbaro de la Perditaj Paŝoj," respondis la malalta viro.

Li estis la diablo.

"Ja vere," respondis Pekopeno, "vi estu, kiu esti al vi plaĉas, sed, ĉar entute vi tenis vian promeson al mi, ĉar mi estas ĉe Falkenbergo, ĉar mi tuj revidos Bolduran, mi estas via, sinjoro, kaj en tuta lojaleco mi vin dankas."

"Ĉi-nokte ĉi min akuzis. Kion mi diris al ĉi?"

"Vi diris: atendu la finon."

"Nu, ĉi nun dankas min, kaj mi ankoraŭfoje diras: Atendu la finon. Ĉi eble tro hastis akuzi min. Nun ĉi eble tro hastas danki min."

Tiel parolante, la malalta ĝibulo havis neesprimeblan mienon. Ironio estas la vizaĝo mem de la diablo.

Pekopeno ekstremetis.

"Kion vi intencas diri?"

La diablo montris al li la maskitan ĉefhundiston.

"Ĉu ci rekonas tiun ĉi viron?"

"Jes."

"Ĉu ci konas lin?"

"Ne."

La ĉefhundisto sin senmaskigis. Li estis Erilangus. Pekopeno sin sentis tremanta.

La diablo daŭrigis:

"Pekopeno, ci estis mia kreditoro. Mi ŝuldis al ci du aferojn, nome tiun ĉi ĝibon kaj tiun ĉi bulpiedon. Nu, mi estas bona debitoro. Mi iris al cia eks-servisto Erilangus por informi min pri ciaj gustoj. Li rakontis al mi, ke ci amas la ĉason. Tiam mi diris: Estus domaĝe ne ĉasigi la nigran ĉason al tiu bela ĉasisto. Dum la suno malaltiĝis, mi cin renkontis sur maldensejo. Ci estis en la arbaro de Perditaj Paŝoj. Mi alvenis ĝustatempe. La nano Rulono estis prenonta cin por si. Mi cin prenis por mi. Jen."

Pekopeno kontraŭvole tremis. La diablo pludiris:

"Se ci ne havus cian talismanon, mi cin konservus. Sed al mi tiom plaĉas, ke la aferoj estas tiaj, kiaj ili estas. La venĝo devas esti spicata per diversaj saŭcoj."

"Sed finfine, kion ci volas diri, demono?" pene reparolis Pekopeno.

La diablo daŭrigis: "Por rekompenci Erilangus'on pro liaj sciigoj, mi faris el li mian dokumentportiston. Li havas bonajn profitojn."

"Fia kanajlo, ĉu fine ci diros, kion tio signifas?" diris Pekopeno.

"Kion mi promesis al ci?"

"Ke post tiu nokto pasigita en ĉaso kun ci, je sunleviĝo, ci kondukos min al Falkenbergo."

"Jen ci tie estas."

"Diru al mi, demono, ĉu Boldura estas mortinta?"

"Ne."

"Ĉu ŝi edziniĝis?"

"Ne."

"Ĉu ŝi prenis al si la vualon?"⁴

"Ne."

"Ĉu ŝi ne estas plu en Falkenbergŝo?"

"Jes ja."

"Ĉu ŝi ne plu amas min?"

"Daŭre."

"En tiu kazo, kaj se ci diras veron," ekkriis Pekopeno, spirante kvazaŭ li estus liberigita de la pezo de monto, "kiu ajn ci estas, kaj kio ajn okazos, mi cin dankas."

"Iru do," diris la diablo, "ci estas kontenta, kaj ankaŭ mi."

Tion dirinte, li ekkaptis Erilangus'on en siaj brakoj, kvankam li estis malgranda kaj Erilangus estis granda; poste, tordante sian misformitan kruron ĉirkaŭ la alia, kaj sin levante sur la piedfingroj, li faris pirueton, kaj Pekopeno vidis lin enprofundiĝi en la teron kiel borileto. Unu sekundon poste li estis malaperinta.

La tero, refermiĝante sur la diablo, ellasis beletan violan lumeton prisemitan per verdaj sparkoj, kiu gaje foriris, kun multaj svingosaltoj kaj kaprioloj, ĝis en la arbaro, kie ĝi restis kelkan tempon haltinta kaj kvazaŭ alkroĉita en la arboj, ilin kolorigante per mil lumaj nuancoj, kiel faras la ĉielarko, kiam ĝi miksiĝas en foliaroj.

⁴ La vualon de monaĥino - N. de la tr.

XVII. La bagateloj de la pordo ¹

Pekopeno eklevis la ŝultrojn. Li pensis: Boldura estas viva, Boldura estas libera, kaj Boldura amas min. Kion mi povas timi? Hieraŭ vespere, antaŭ ol mi renkontis tiun demonon, estis precize kvin jaroj, de kiam mi ŝin lasis. Nu, estas kvin jaroj kaj unu tago. Mi ŝin revidos pli bela ol iam ajn. La virinoj estas la bela sekso; kaj dudek jaroj estas la bela aĝo.

En tiu tempo de fortikaj fidelecoj, oni ne timis pri kvin jaroj.

Tiel monologante li proksimiĝis al la kastelo, kaj kun ĝojo rekonis ĉiun bosajon de la portalo, ĉiun denton de la herso, kaj ĉiun najlon de la levponto. Li sin sentis feliĉa kaj bonvena. La sojlo de la domo, kiu vidis nin infanoj, ridetas, nin revidante maturaj homoj, kiel la kontenta vizaĝo de patrino.

Dum li trairis la ponton, li rimarkis apud la tria arko tre belan kverkon, kies kapo tre alte superas la parapeton de la ponto. "Strange," li diris, "ĉar tie estis neniu arbo." Poste li rememoris, ke du aŭ tri semajnojn antaŭ la tago, en kiu li renkontis la ĉason de la Palatino, li ludis kun Boldura la ostet- kaj glan-ludon, sin kubutapogante sur la parapeto, kaj ke, precize en tiu loko, li lasis fali glanon en la fosaĵon.

"Diable!" li pensis, "la glano fariĝis kverko en la daŭro de kvin jaroj. Jen estas bona grundo!"

Kelkaj birdoj sidantaj sur tiu kverko vete babilis. Ili estis garolo, merlo, pigo kaj korvo. Pekopeno apenaŭ atentis pri ili, ne pli pri kolombo kveranta en kolombujo kaj pri kokino klukanta sur la birdokorto.

¹.Laŭvorta traduko de franca esprimo, kiu signifas: la flirtaĵoj kaj karesoj, kiuj antaŭas la amoradon - N. de la tr.

Li pensis sur pri Boldura, kaj li hastis. Ĉar la suno estis jam super la horizonto, la pordservistoj ĵus mallevis la levponton. En la momento, kiam Pekopeno eniris tra la pordego, li aŭdis malantaŭ si rideksplodon, kiu ŝajnis veni de tre malproksime, kvankam ĝi estis perfekte distingebla kaj tre longdaŭra. Li eksteren rigardis ĉiuflanke, kaj vidis neniun. Tio estis la diablo ridanta en sia kaverno.

Sub la volbo estis akvujo, kiun la ombro kaj la rebrilo ŝanĝis en spegulon. La kavaliro sin klinis super ĝi. Post la lacigoj de tiu vojaĝo, kiu apenaŭ lasis sur lia korpo kelkajn ĉifonvestojn, precipe post la skuadoj de tiu nokto de supernatura ĉasado, li atendis esti timigita de si mem. Tute ne: ĉu pro povo de la talismano al li donacita de la sultanino, ĉu pro efiko de la eliksiro, kiun la diablo trinkigis al li, li estis pli ĉarma, pli freŝa, pli juna kaj pli ripozigita ol iam ajn. Kio precipe lin mirigis, estis vidi sin kovrita de tute novaj kaj tute belegaj vestoj. La ideoj estis en lia cerbo tiel konfuzaj, ke li ne povis rememori, en kiu momento de la nokto oni tiel ekipis lin. Tiel li estis tre bela. Li havis la veston de princo kaj la mienon de feo.

Dum li sin speguligis, iom mirigita sed tre kontenta, kaj sin trovante laŭ sia gusto, li aŭdis duan rideksplodon ankoraŭ pli ĝojan ol la unua. Li returnis sin, kaj vidis neniun. Estis la diablo ridanta en sia kaverno.

Li trairis la plej belan korton. La soldatoj kliniĝis ĉe la kreneloj de la murego; neniu lin rekonis, kaj li rekonis neniun. La servistinoj kun mallongaj jupoj, kiuj batis la tukaron ĉe la bordo de la lavejo, sin turnis. Neniu lin rekonis, kaj li rekonis neniun. Sed li havis tiel bonan aspekton, ke oni lasis lin pasi. Granda mieno supozigas grandan nomon.

Li konis sian vojon, kaj li sin direktis al la malgranda tureta ŝtuparo kondukanta al la ĉambro de Boldura. Dum li trairis la korton, al li ŝajnis, ke la fasado de la kastelo estas ja tre malheliĝinta kaj faltita, kaj ke la hedero sur la norda muro estas senmezure densiĝinta, kaj ke la ampelosoj de la suda muro estas strange plidikiĝintaj. Sed ĉu amanta koro ekmiras pro kelkaj nigraj ŝtonoj kaj pro kelkaj folioj pliaj aŭ malpliaj?

Kiam li alvenis al la tureto, li spertis kelkan malfacilon por rekoni ĝian pordon. La volbo de tiu ŝtuparo estis volbo kvaronŝraŭba pendanta de ronda turo, kaj je la tempo, kiam Pekopeno foriris de la regiono, la patro de Boldura ĵus nove konstruigis la enirejon per bela blanka grejso de Hejdelbergo. Nu, tiu enirejo, kiu laŭ la kalkulo de Pekopeno estis konstruita antaŭ apenaŭ kvin jaroj, estas nun tre bruniĝinta kaj tute fendita kaj rongita de herboj, kaj sub sia volbo ĝi ŝirmis tri aŭ kvar hirundajn nestojn. Sed ĉu amanta koro miras pro kelkaj hirundaj nestoj?

Se la fulmoj kutimus supreniri ŝtuparojn, mi komparus Pekopenon al ili. En la daŭro de palpebrumo li atingis la kvinan etaĝon, antaŭ la pordo de la retirigejo de Boldura. Almenaŭ tiu ĉi pordo estis nek nigriĝinta nek ŝanĝiĝinta; ĝi estis ankoraŭ pura, gaja, neta kaj senmakula kun siaj feraĵoj brilaj kiel arĝento, kun la tuberoj de sia ligno helaj kiel okulo de bela knabino, kaj oni ja vidis, ke ĝi estas tiu sama virgulina pordo, kiun la juna kastelanino neniam preterlasis lavigi ĉiumatene de siaj servistinoj. La ŝlosilo estis en la seruro, kvazaŭ Boldura atendus Pekopenon.

Al li restis nur meti la manon sur tiun ŝlosilon, kaj eniri. Li haltis. Li estis spireganta pro ĝojo, tenero kaj feliĉo, kaj iom pro tio, ke li supreniris kvin etaĝojn. Antaŭ liaj okuloj pasis grandaj rozaj flamoj, kaj al li ŝajnis, kvazaŭ ili freŝigus lian frunton. Lian kapon pleningis zumado, lia koro batis en liaj tempioj.

Kiam tiu unua momento estis kvietigita, kiam silento komencis fariĝi en li, li aŭskultis. Kiel diri tion, kio emociiĝis en tiu kompatinda animo ebria pro amo? Li aŭdis tra la pordo la bruon de ŝpinrado en la ĉambro.

XVIII. Kie la gravaj spiritoj ekscios, kiu estas la plej impertinenta el la metaforoj.

En ekstrema okazo tio povis ja ne esti la ŝpinrado de Boldura; eble tio estis nur la ŝpinrado de unu el ŝiaj servistinoj; ĉar apud sia ĉambro Boldura havis preĝoĉambron, en kiu ŝi ofte pasigis siajn tagojn; se ŝi multe ŝpinis, ŝi eĉ pli multe preĝis. Pekopeno ja iam diris al si ĉion ĉi, tamen li aŭskultis la ŝpinradon en ne malpli granda ravo. Tiaj estas stultaĵoj de amanto, kiujn oni faras precipe, kiam oni havas grandan spiriton kaj grandan koron.

La momentoj, kiaj tiu, en kiu troviĝis Pekopeno, konsistas el ekstazo, kiu volas atendi, kaj malpacienco, kiu volas eniri; la ekvilibro daŭras kelkajn minutojn, poste venas momento, en kiu venkas la malpacienco. Pekopeno tremante metis la manon sur la ŝlosilon; ĝi turniĝis en la seruro, la serurlango cedis, la pordo malfermiĝis. Li eniris.

"Ha," li pensis, "mi eraris. Tio ne estis la ŝpinrado de Boldura."

En la ĉambro ja estis iu ŝpinanta, sed tiu estis maljuna virino. Maljuna virino, estus tro malmulte diri, ŝi estis maljuna feino, ĉar nur feinoj atingas tiel fabelajn aĝojn kaj tiajn jarcentajn kadukecojn. Nu, tiu duenjo* ŝajnis kaj nepre estis pli ol centjara. Imagu, se vi povas, kompatindan, etan homan aŭ superhoman kreitaĵon kurbiĝintan, faltitan, rompitan, tanitan, rustiĝintan, raukan, skvamecan, kun malbonhumora, seke kuntiriginta, malafabla mieno, kun brovoj kaj haroj blankaj, dentoj kaj lipoj nigraj, la cetero flava, malgrasega, kalva, senlanuga, teraspekta, ŝanceliĝanta kaj malbelega. Kaj se vi volas havi ideon pri tiu vizaĝo, en kiu mil faltoj konverĝis al la buŝo kiel radioj de rado al la aksingo, imagu, ke vi

vidas vivi la malrespektan metaforon de la latinanoj, **anus**.¹ Tiu respektinda kaj abomeninde malbela estulino estis sidanta aŭ kaŭranta apud la fenestro, kun la okuloj mallevitaj al sia ŝpinrado kaj la ŝpinilo en la mano kiel Parco.

La bona damo estis probable tre surda, ĉar, je la bruo de la pordo malfermiĝanta kaj de Pekopeno eniranta, ŝi ne moviĝis.

Tiam la kavaliro demetis sian kapveston, kiel decas antaŭ tiel grandaĝa persono, kaj diris antaŭenpaŝante: "Sinjorino duenjo, kie estas Boldura?"

La centjara sinjorino levis la okulojn, lasis fali sian fadenon, ekstremis per siaj tutaj etaj membroj, eligis etan krion, duonleviĝis sur sia seĝo, etendis al Pekopeno siajn longajn manojn de skeleto, fiksitis sur lin sian okulon de fantomo, kaj diris per voĉo mallaŭta kaj osteca, kiu ŝajnis eliri el tombo: "Ho ĉielo! kavaliro Pekopeno, kion vi volas? Ĉu vi bezonas mesojn? Ho mia Dio Sinjoro! kvaliro Pekopeno, vi do estas mortinta, ĉar jen revenas via fantomo?"

"Pro Dio, mia bona damo," respondis Pekopeno ekridante, kaj tre laŭte parolante, por ke Boldura lin aŭdu, se ŝi estas en sia preĝoĉambro, iom mirante tamen, ke tiu duenjo konas lian nomon: "Mi ne estas mortinta, ne mia fantomo aperas, sed ja mi revenas, se al vi plaĉas, mi Pekopeno, bona revenanto el karno kaj ostoj. Kaj mi ne volas mesojn, mi volas kison de mia fianĉino, de Boldura, kiun mi amas pli ol iam ajn. Ĉu vi aŭdis, mia bona damo?"

Dum li finis tiujn vortojn, la maljunulino sin ĵetis al lia kolo.

Ŝi estis Boldura.

Ho ve! la ĉasnokto de la diablo daŭris cent jarojn.

Boldura ne estis mortinta, dank'al Dio aŭ al la demono: sed je la tempo, kiam Pekopeno, tiel juna kaj eble pli bela ol iam, ŝin retrovis kaj revidis, la kompatinda knabino aĝis cent dudek jarojn kaj unu tagon.

1. En latino **anus** = anuso, kaj ankaŭ = maljunulino - N. de la tr.

XIX. Belaj kaj saĝaj vortoj de kvar dupiedaj plumornamitaj filozofoj.

Pekopeno duonfreneze forfuĝis. Li impetis al la mal-supro de la ŝtuparo, trakuris la korton, puŝis la pordegon, suprengrimpis la deklivon, transiris la ravinon, transsaltis la torenton, truis la dornaĵon, suprenrampis la monton kaj rifuĝis en la arbaro de Sonneck. Li kuris la tutan tagon, konsternegita, terurita, malesperanta, freneza. Li daŭre amis Bolduran, sed li abomenis tiun fantomon. Li ne sciis plu, kie estas lia menso, kie estas lia memoro, kie estas lia koro. Kiam vesperiĝis, vidante, ke li proksimiĝas al la turoj de sia kastelo, li disŝiris siajn riĉajn ironiajn vestojn havigitajn de la diablo, kaj ĵetis ilin en la profundan torenton de Sonneck. Poste li deŝiris de sia kapo harojn, kaj subite li ekvidis, ke li tenas plenmanon da blankaj haroj. Poste, subite, jen liaj genuoj ekstremitis, lia lumbo fleksiĝis, li devis apogi sin al arbo, liaj manoj estis terure faltitaj. En la deliro de sia doloro, ne plu konsciante, kion li faras, li kaptis la talismanon pendantan de lia kolo, rompintis ĝian ĉenon, kaj ĵetis ĝin en la torenton kune kun siaj vestoj.

Kaj en tiu momento tuj plenumiĝis la vortoj de la sklavino de la sultanino. Li ĵus maljuniĝis je cent jaroj en unu minuto. Matene li estis perdinta sian amon, vespere li perdis sian Junecon. En tiu momento, triafoje en tiu fatala tago, iu rideksplodis ie malantaŭ li. Li turnis sin, kaj vidis neniun. La diablo ridis en sia kaverno.

Kion fari post tiu lasta subpremeĝo? Li deprenis de sur la tero branĉfasketon forgesitan de iu branĉfaskisto, kaj sin apogante sur tiu bastono, li pene marŝis al sia kastelo, kiu feliĉe estis tre proksima.

Dum li tie alvenis, li vidis en la lastaj radioj de la

krepusko garolon, pigon, merlon kaj korvon, kiuj estis sid-
antaj sur la tegmento de la pordego inter la ventoflagoj,
kaj kiuj ŝajne lin atendis. Li aŭdis kokinon de li nevidatan,
kiu diris: "Pekopen"! Pekopen!" Kaj li aŭdis kolombon same
nevidatan, kiu diris: "Boldur"! Boldur"! Boldur!" Tiam li
rememoris pri sia songo en Baĥaraĥ kaj pri la vortoj al li
iam diritaj - ho ve! antaŭ cent kvin jaroj! - de la maljun-
ulo, kiu ordigis trunkostumpojn laŭlonge de muro: "Sinjoro,
por junulo la merlo fajfas, la garolo garolas, la pigo kri-
ĉas, la korvo grakas, la kolombo kveras, la kokino klukas.
Por maljunulo la birdoj parolas." Li do ekaŭskultis, kaj jen
estas la dialogo, kiun li aŭdis:

La merlo

"Fine, bela ĉasisto, ci revenis al tur'."

La garolo

"Forironto por jaro kredas por tago nur."

La korvo

"Ci ĉasis al la aglo, la milvo, la vultur'."

La pigo

"Preferinde al dolĉa la amobirdo nur."

La kokino

"Pekopen"! Pekopen!"

La kolombo

"Boldur"! Boldur"! Boldur!"

Fino.

Glosaro

- baùdhundoj : raso de ĉashundoj el Berberio, ankaŭ nomataj cervo-
hundoj aŭ mutaj hundoj.
- duenjo : maljuna gubernistino de juna nobelino (fr. duègne, el la his-
pana dueña)
- ĝineto : ido de araba virĉevalo kaj de hispana ĉevalino (france genet,
angle jennet, itale gineto, hispane caballo berberico)
- ĝjaur : (arabe) kristano, eŭropano.
- kelksino (france, herbe helxine, novlatine Helxine soleirollii)
- lanereto (france laneret, angle lanneret) virfalko el la raso lanier
(angle lannier), kiu estas ankaŭ la nomo de la ino. La lanereto,
malpli granda ol la ino, estas rapida ĉasbirdo.
- lavatero : france lavatère (Fakterminaro botanika de Pilger)
- leùgo (france lieue, okcitane lego) longunuo = 4 kilometroj.
- miramoleno : titolo de araba regnestro aŭ provincestro.
- onagro : mamulo intermeza inter ĉevalo kaj azeno (france onagre,
el la latina onager, onagrus, greka onagros = sovaĝa azeno). Ĝi
vivas en Persio kaj Hindio.
- sakereto : raso de ĉasfalkoj (france sacret, angle saker, svede tartar
valk, novlatine Falco cherrug)
- tartareto : raso de ĉasfalkoj (france tartaret) ŝajne sakereto kaj
tartareto estas sinonimoj
- tuniziano : raso de ĉasfalkoj el Tunizio (france tuniciens)

LISTO DE SAT-BROŝURSERVO

Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj)	Prezo en FF
AA. La Aperoĵ de Ahasvero (Han Riner)	20
AL. Alvokoj al la homa konscienco (APJR)	6
AN. Nia angorplena socio (Milan Simečka)	3
AO. Anarkio kaj organizo (Malatesta)	4
AR. Argentina Novelaro (18 noveloj)	20
BA. Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)	20
BP. Legendo pri la bela Pekopeno (V.Hugo)	15
BU. La racia kaj ateista budhismo	4
ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti)	6
DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio	25
DU. Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario)	3
EA. Esperanto in 24 pages (angla)	1,00
EH. Esperanto en 24 paginas (hispana)	3
EI. Esperanto su 24 pagine (itala)	3
EL. Elekto de tekstoj de Bakunin	10
ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin)	12
ET. Etiko I (Kropotkin)	12
EV. Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti)	4
FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo	4
FE. Esprimaro FrancaEsperanta (Bourgeois)	45
FI. Laŭ la fluo de l'interparolo (Bourgeois) Esp./Fr.	8
FZ. Filozofio Zoologia (Lamarck)	20
GE. Abrégé de grammaire esp-o (Lentaigne)	7
HP. Humanitaristaj Principoj (Eugen Relgis)	3
IE. Initiation à l'Esperanto (An Kaŭ)	5
IM. Individuista Manlibreto (Han Riner)	4
IN. Individualisma socialismo de A.R.Protschowsky	2
JA. Jaro 2000 (H. Muller) disdona ekonomio	30
KD. La Krimoj de Dio (Sébastien Faure)	4
KE. La Kvina Evangelio (Han Riner)	15
KF. Kontraŭflue (Valo)	12
KI. El la kara infaneco... (Valo)	12
KK. Komuna Kantareto	2
KP. Katastrofplano pri Fessenheim + Wyhl	5
LA. Lingvaj Anguloj (Baronnet)	10
LE. La laborista esperantismo (Lanti)	3
LK. La Konflikto (Le Dantek)	
+ Dubi (Alain) tr. Lanti	20

Ricevas la mendojn :

Cercle amical esp. agenais, F 47340 Laroque

pĉk: BORDEAUX 3371 74 M

LL. Leteroj de Lanti (ĝis 1937)	45
LM. La Mondo ne havas atendejon (Dekker)	15
LN. Linguistique et nonviolence (Masson)	2
LR. La Ribelo (Joseph Roth) romano	18
MB. Imaga dialogo Marks/Bakunin (Cranston)	(els.)
ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon)	4
MN. Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre)	6
MS. Memvola Servuto (La Boétie)	4
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)	10
NE. Naciismo kaj Esperantismo (S.Aarse)	8
NC. Naciismo (Lanti)	12
NI. Nia Individuismo (E. Armand)	4
NL. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak)	3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman)	35
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktoj)	15
PF. Proverbaro Franca/Esperanta (Bourgeois)	
+ Esprimoj sankciitaj de l'uzado	12
PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval)	3
PN. Politika Neperforto (M.A.N.)	8
PS. Psikotransformismo (Ergoto de Bonaero)	4
PT. Piramido de l' Tiranismo (Domela Nieuwenhuis)	3
RA. Revolucia registaro. Pariza Komuno (Kropotkin)	6
RO. Rompoj (A.Jacquard)	4
SA. Kio estas SAT ? (H.Masson)	3
SJ. Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo)	12
SN. Sveda Novelaro	30
SR. Les 16 règles commentées (R.Laval)	3
SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek)	4
TD. Tiel diru! (Lentaigne) suppl. de DI por francoj	25
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano	20
US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak)	3
VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts)	10
VI. Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner)	20
VL1. <u>Verkoj de Lanti 1.</u> (Adamaĵoj, Absolutismo, Herezulo, Herezaĵo)	20
VL2. <u>Verkoj de Lanti 2.</u> (3 semajnojn en Rusio Tro Plena Gramatiko, Diskutejo, Epiloge)	20
VL3. <u>Verkoj de Lanti 3.</u> (Artikoloj, paroladoj kaj ekstraktoj el leteroj de 1937 ĝis 1946)	20
VO. Vortoj de Kamarado E. Lanti	20
VT. El verkoj de Leo Tolstoj (Patriotismo kaj registaro, Al politikistoj, Ĥodinka, Ne mortigu!)	7
ZH. La Zamenhofa Homaranismo (A. Caubel)	4